Karlo Markso; Frederiko Engelso

# Tezoj pri Fojerbaĥo
# Principoj de komunismo
# kaj aliaj verketoj

Karlo Markso; Frederiko Engelso

# Tezoj pri Fojerbaĥo,
# Principoj de komunismo

## kaj aliaj verketoj

Monda Asembleo Socia (MAS)

Karlo Markso; Frederiko Engelso:
Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo
kaj aliaj verketoj
elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano
Monda Asembleo Socia (MAS)
2010
ISBN 978-2-918300-17-5

# Enhavo

Karlo Markso: Tezoj pri Fojerbaĥo........................................... 6
Karlo Markso: La politika indiferentismo .............................. 10
Karlo Markso; Frederiko Engelso: Postuloj de la Komunista Partio en Germanio ............................................................ 17
Frederiko Engelso: Kontribuo de la laboro al la homiĝo de la simio...................................................................... 20
Frederiko Engelso: Principoj de komunismo.......................... 35

# Karlo Markso: Tezoj pri Fojerbaĥo

Laŭ Karl Marx/Friedrich Engels: Werke, vol. 3, p. 533 sj, (Karl) Dietz Verlag, Berlino (GDR), 1969, en la reta versio de
http://www.mlwerke.de/me/me03_533.htm
Tiu ĉi estas la versio publikigita de Engelso en 1888 kiel anekso al „Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la germana filozofio”[1], de la teksto verkita de Markso en 1845.

1.

La ĉefa manko de ĉiu ĝisnuna materiismo - inkluzive de la fojerbaĥa – estas ke la objekto, la realo, senseco, estas prenata nur en la formo de la *objekto* aŭ de la *rigardo*; sed ne kiel *homa sensa agado*, praktiko, ne subjektive. Pro tio okazis ke la aganta flanko, kontraste al la materiismo, estis disvolvita de la idealismo – sed nur abstrakte, ĉar la idealismo kompreneble ne konas la realan, sensan agadon kiel tian. Fojerbaĥo volas sensajn objektojn reale distingatajn disde pensobjektoj; sed li prenas la homan agadon mem ne kiel *objektan*[2] agadon. Li konsideras do en la „Esenco de la kristaneco”[3] nur la teorian konduton kiel la vere homan, dum la praktiko estas prenata kaj fiksita nur en sia malpura-juda aperformo. Li pro tio ne komprenas la signifon de la „revolucia”[4], de la praktike kritika agado.

2.

La demando, ĉu al la homa pensado atribueblas objekta vero, estas demando ne de teorio, sed *praktika* demando. En la praktiko la homo devas pruvi la veron, t.e. la realon kaj potencon, la ĉimondecon de sia pensado. La disputo pri la realeco aŭ nerealeco de pensado, kiu izoliĝas de la praktiko, estas pure *skolastika* demando.

3.

La materiisma instruo, ke la homoj estas produktoj de la cirkon-

---

[1]Originale: „Ludwig Feuerbach und der Ausgang der deutschen Philosophie” -vl
[2]Originale: *gegenständliche* Tätigkeit. -vl
[3]Originale: „Wesen des Christenthums”. -vl
[4]Originale: „umwälzende”. -vl

stancoj kaj de la edukado, ŝanĝitaj homoj do produktoj de aliaj cirkonstancoj kaj de ŝanĝita edukado, forgesas ke la cirkonstancoj estas ŝanĝataj ĝuste de la homoj kaj ke la edukisto devas mem esti edukata. Ĝi do nepre alvenas al tio, ke ĝi dividas la socion en du partojn, el kiuj unu superas[5] la socion. (Ekz-e ĉe Robert Owen.)

La kuniĝo de ŝanĝiĝo de la cirkonstancoj kaj de la homa agado racie kompreneblas nur kiel *revolucia praktiko*[6].

4.

Fojerbaĥo deiras de la fakto de la religia memfremdiĝo, de la duobligo de la mondo en religian, imagatan kaj en realan mondon. Lia laboro konsistas en tio, dissolvi la religian mondon en ĝian mondan bazon. Li pretervidas ke post plenumado de tiu laboro la ĉefaĵo restas farenda. Nome la fakto ke la monda bazo disiĝas de si mem kaj fiksiĝas kiel memstara regno en la nuboj, klarigeblas ĝuste nur el la memdisŝiriteco kaj el la memkontraŭdirado de tiu monda bazo. Tiu mem estas do unue komprenota en sia kontraŭdiro kaj poste praktike revoluciota per forigo de la kontraŭdiro. Do ekz-e, post kiam la tera familio estas malkovrita kiel la sekreto de la sankta familio, nun la unua estas mem teorie kritikenda kaj praktike revolucienda[7].

5.

Fojerbaĥo, ne kontenta pri la *abstrakta* pensado, alvokas la *sensan rigardon*; sed li prenas la sensecon ne kiel *praktikan* home sensan agadon.

6.

Fojerbaĥo dissolvas la religian estulon en la *homan* estulon. Sed la homa estulo ne estas abstraktaĵo ene de la unuopa individuo. En sia realo ĝi estas la tutaĵo de la sociaj kondiĉoj.

Fojerbaĥo, kiu ne reagas al la kritiko de tiu reala estulo, estas do

[5]Originale: über der Gesellschaft erhaben ist. -vl

[6]Originale: als *umwälzende* Praxis (ŝanĝeganta praktiko); en la unua versio de 1845: *revolutionäre* Praxis (revolucia praktiko). -vl

[7]En la unua versio de 1845: „praktike neniigenda”. -vl

devigata:

1-e abstrakti de la historia procezo kaj fiksi la religian menson por si kaj antaŭkondiĉi iun abstrakte – *izolite* – homan individuon;

2-e ĉe li la homa estulo kompreneblas do nur kiel *„specio”*, kiel interna, muta ĝeneralaĵo kiu ligas la multajn individuojn nur *nature*.

7.

Fojerbaĥo pro tio ne vidas, ke la „religia menso” estas mem *socia produkto* kaj ke la abstrakta indiviuo, kiun li analizas, apartenas en realo al certa sociformo.

8.

La socia vivo estas esence *praktika*. Ĉiuj misteroj kiuj delogas la teorion al mistikismo, trovas sian racian solvon en la homa praktiko kaj en la kompreno de tiu praktiko.

9.

La plej alta atingo de la rigardanta materiismo, t.e. de la materiismo kiu komprenas la sensecon ne kiel praktikan agadon, estas nur la rigardo de la unuopaj individuoj en la „burĝa socio”.

10.

La starpunkto de la malnova materiismo estas la *„burĝa”* socio; la starpunkto de la nova la *homa* socio, aŭ la sociiĝinta homaro[8].

11.

La filozofoj nur diverse *interpretis* la mondon; sed necesas *ŝanĝi* ĝin.

[8]En la versio de 1845: „la socia homaro”. -vl

# Karlo Markso: La politika indiferentismo

Laŭ: Karl Marx/Friedrich Engels: Werke [MEW]. (Karl) Dietz Verlag, Berlin. Volumo 18, 5. Eldono 1973, senŝanĝa represo de la 1-a eldono 1962, Berlino/GDR, p. 299-204, laŭ la reta versio en:
http://www.mlwerke.de/me/me18/me18_299.htm

Verkita fine de 1872 - komence de januaro 1873.
Laŭ: „Almanacco Rebubblicano per l'anno 1874".
El la itala.

„La laborista klaso ne rajtas konstituiĝi kiel politika partio, ĝi rajtas neniapretekste entrepreni politikan agon, ĉar la batalo kontraŭ la ŝtato estas la agnosko de la ŝtato, kaj tio kontraŭdiras la eternajn principojn! La laboristoj ne rajtas fari strikon, ĉar malŝpari fortojn por atingi altigon de la salajro aŭ malhelpi ties malaltigon, signifas agnoski la *sistemon de dunglaboro*, kaj tio kontraŭdiras la eternajn principojn de la liberigo de la laborista klaso!

Se la laboristoj unuiĝas en sia politika batalo kontraŭ la burĝa ŝtato, nur por atingi koncedojn, tiam ili faras kompromisojn, kaj tio kontraŭdiras la eternajn principojn! Oni devas do kondamni ĉian pacan moviĝon kian la anglaj kaj usonaj laboristoj entreprenas pro malbona kutimo. La laboristoj ne malŝparu siajn fortojn por atingi leĝan limon de la labortago, ĉar tio signifas fari kompromisojn kun la entreprenistoj, kiuj tiam povus ekspluati la laboristojn jam nur 10 aŭ 12 horojn anstataŭ 14 aŭ 16. Same ili ne klopodu atingi leĝan malpermeson de fabriklaboro de knabinoj malpli ol dekjaraj, ĉar per tiu rimedo ankoraŭ ne estas forigita la ekspluatado de subdekjaraj knaboj; ili konsentas per tio novan kompromison, kaj tio makulas la purecon de la eternaj principoj!

Eĉ malpli la laboristoj postulu, ke, kiel okazas en la usona respubliko, la ŝtato, kies buĝeto estas starigita sur kostoj de la laborista klaso, estu devigata doni al la infanoj de la laboristoj bazan instruadon, ĉar la baza instruado ankoraŭ ne estas universitata instruado. Estas pli bone se la gelaboristoj ne povu legi nek skribi, ne kalkuli, ol ke ili ricevu la instruadon de instruisto en ŝtata lernejo.

> Estas signife pli bone se nescio kaj ĉiutaga laboro de 16 horoj stuporu, ol ke rompiĝu la eternaj principoj!
>
> Se la politika batalo de la laborista klaso alprenas perfortajn formojn, se la laboristoj metas anstataŭ la diktatoreco de la burĝaro sian revolucian diktatorecon, tiam ili faras la teruran krimon de principrompo, ĉar ili, pro kontentigo de siaj mizeraj profanaj ĉiutagaj bezonoj, pro rompo de la rezistado de la burĝaro, donas al la ŝtato revolucian kaj provizoran formon, anstataŭ demeti la armilojn kaj forigi la ŝtaton. La laboristoj ne rajtas formi unuopajn metiajn sindikatojn por ĉiu profesio, ĉar per tio ili eternigas la socian labordividon, kiu ekzistas en la burĝa socio; tiu labordivido, kiu dividas la laboristojn, estas ja la vera bazo de ilia sklaveco.
>
> Per unu vorto, la laboristoj krucigu la brakojn kaj ne disipu sian tempon por politikaj kaj ekonomiaj movadoj. Ĉiuj ĉi movadoj povas doni al ili nenion ol tujajn rezultojn. Kiel vere religiaj homoj ili devas, malestimante la ĉiutagajn bezonojn, elkrii kredoplene: „Krucumiĝu nia klaso, pereu nia raso, sed restu la eternaj principoj!” Kiel piaj kristanoj ili devas kredi la vortojn de la pastro, malestimi la havaĵojn de tiu ĉi Tero kaj strebi nur gajni la paradizon. Se vi legas anstataŭ paradizo la socian likvidadon, kiu okazos iun belan tagon en iu loko de la mondo, neniu scias farite kiel kaj de kiu, kaj la mistifiko estas komplete la sama.
>
> Atendante tiun belan socian likvidadon, la laborista klaso devas do konduti kiel bone nutrita ŝafaro, lasi la registaron trankvila, timi la policon, respekti la leĝojn kaj sengrumble liveras la kanonkarnon.
>
> En sia ĉiutaga praktika vivo la laboristoj devas esti la plej obeaj servistoj de la ŝtato, sed en sia interno ili devas plej energie protesti kontraŭ ĝia ekzisto kaj montri al ĝi sian profundan malestimon per aĉetado kaj legado de literaturaj traktaĵoj pri forigo de la ŝtato; sed ili devas gardi sin kontraŭmeti al la kapitalisma ordo alian rezistadon ol deklamadojn pri la socio de la estonto, en kiu la ekzisto de tiu malamata ordo ĉesos!”

Neniu kontestos ke la apostoloj de la politika indiferentismo, se ili tiom klare parolintus, jam delonge estus de la laborista klaso pelitaj al la diablo; la laborista klaso komprenintus tion kiel ofendo fare de doktrinecaj burĝoj kaj de degenerintaj nobeloj, kiuj estas tiom stultaj aŭ naivaj rifuzi al ĝi ĉiun realan batalrimedon, ĉar oni devas preni ĉiujn ĉi batalrimedojn el la hodiaŭa

socio kaj ĉar la fatalaj kondiĉoj de tiu batalo havas la malbonŝancon ne adaptiĝi al la idealismaj fantazioj, kiujn tiuj doktoroj pri *sociscienco* per la nomoj *libereco, aŭtonomeco, anarĥio* altigis al diaĵo. Sed nun la movado de la laborista klaso estas tiom forta ke tiuj filantropiaj sektemuloj jam ne havas la kuraĝon ripeti pri la ekonomia batalo la samajn *grandajn veraĵojn* kiujn ili senĉese proklamis pri la politika batalo. Ili estas tro malkuraĝaj apliki tiujn veraĵojn ankaŭ al la strikoj, koalicioj, metisindikatoj, al la leĝoj pri virin- kaj infan-laboro, pri la limigo de la labortago ktp ktp.

Ni rigardu nun, kiomgrade ili povas alvoki la bonajn tradiciojn, la hontemon, la honestecon, la eternajn principojn!

La unuaj socialistoj (Fourier, Owen, Saint-Simon ktp) devis – ĉar la sociaj kondiĉoj estis ankoraŭ ne sufiĉe evoluintaj por ebligi al la laborista klaso konstituiĝon kiel politika partio – kontentiĝi per revoj pri la *modelsocio* de la estonto kaj kondamni ĉiajn provojn, kiel strikojn, koaliciojn, politikajn agojn, kiujn la laboristoj entreprenis por iomete plibonigi sian situacion. Sed se ni ne havas la rajton malkonfesi tiujn prapatrojn de la socialismo, same kiel la modernaj ĥemiistoj ne havas la rajton malkonfesi siajn patrojn, la alĥemiistojn, ni tamen devas gardi nin refali en iliajn erarojn, kiuj, se faritaj de ni, estus nepardoneblaj.

Tamen multe pli poste, en la jaro 1839, kiam la politika kaj ekonomia batalo de la laborista klaso en Anglio alprenis jam klaran karakteron, Bray, unu el la disĉiploj de Owen kaj unu el tiuj kiuj jam longe antaŭ Prudono[9] malkovris la *mutualismon*, publikigis libron: „Labour's wrongs and labour's remedy” *(La malbonaĵoj de la laboro kaj la kuraciloj de la laboro)*.

En unu el la ĉapitroj pri la senefikeco de ĉiuj kuraciloj, kiujn oni volas atingi per estanteca batalo, li amare kritikas ĉiujn ekonomiajn same kiel ĉiujn politikajn movadojn de la anglaj laboristoj; li kondamnas la politikan movadon, la strikojn, la mallongigon de la labortempo, la reguladon de la fabriklaboro de virinoj kaj infanoj, ĉar ĉio ĉi, laŭ lia opinio, anstataŭ elkonduki el la hodiaŭa stato de la socio, nur katenas nin al ĝi kaj nur pli akrigas la kontraŭdirojn.

Kaj nun ni venas al la orakolo de tiuj doktoroj de la sociscienoj, al Prudono. Dum la granda majstro kuraĝis esprimi sin kontraŭ ĉiuj ekonomiaj movadoj (koalicioj, strikoj ktp) kiuj kontraŭdiras la elsavajn teoriojn de lia mutualismo, sed tamen per siaj skriboj kaj sia persona partopreno subtenis la politikan batalon de la laborista klaso, liaj disĉiploj ne kuraĝas malkaŝe kontraŭi la movadon. Jam 1847, en tempo kiam la granda verko de la

[9]Origninale: Proudhon. -vl

majstro, la „Sistemo de la ekonomiaj kontraŭdiroj" aperis, mi refutis ĉiujn liajn sofismojn kontraŭ la laborista movado.[10] Sed en la jaro 1864, post adopto de la *Lex Ollivier*, leĝo kiu, kvankam en tre limigita mezuro, donis al la francaj laboristoj la rajton je koalicio, Prudono revenis al la sama temo en sia libro „La politikaj kapabloj de la laboristaj klasoj", kiu aperis kelkajn tagojn post lia morto.

La atakoj de la majstro estis tiom laŭ la gusto de la burĝoj ke la „Times", okaze de la granda striko de la londonaj tajloristoj en la jaro 1866, donis al Prudono la honoron traduki lin kaj kondamni la strikantojn per liaj propraj vortoj. Jen kelkaj ekzemplo de tio.

La ministoj de Rive-de-Gier ekstrikis; por resaĝigi ilin, alrapidis soldatoj.

> „La instanco", elkrias Prudono, „kiu mortpafigis la ministojn de Rive-de-Gier, troviĝis en malfeliĉa situacio. Sed ĝi agis kiel la maljuna Bruto[11], kiam li devis decidiĝi por sia patra amo aŭ por sia devo kiel konsulo; li devis oferi siajn infanojn por savi la respublikon. Bruto ne hezitis, kaj la posteularo ne kuraĝis kondamni lin pro tio."[12]

Neniu laboristo memoros ke burĝo iam ajn hezitis oferi siajn laboristojn por savi siajn interesojn. Kiaj Brutoj estas ja la burĝoj!

> „Ne, ekzistas same nenia rajto je koalicio kiom ekzistas rajto je trompo kaj ŝtelo, same kiel ne ekzistas rajto je incesto aŭ adulto."[13]

Oni devas tamen diri ke ekzistas rajto je *stulteco*. Kiaj estas tiuj eternaj principoj, en kies nomo la majstro ĵetas sian sorĉajn ostraciojn?

---

[10] Vidu en la libreto „Misère de la philosophie. Réponse à la philosophie de la misère de M. Proudhon" (Parizo, A. Frank, 1847), ĉapitro II, § 5, „Les grèves et les coalitions des ouvriers". [piednoto de Karlo Markso] – en Esperanto: Karlo Markso: Mizero de la filozofio. Respondo al Prudono: „La filozofio de la mizero", Kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso kaj de Henri Mougin, Pri J. P. Prudono (Letero al J. B. v. Schweitzer), Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 978-2-918300-08-3, § 5 „Strikoj kaj laboristkoalicioj", p. 177. -vl

[11] Originale (latine): Brutis. -vl

[12] Proudhon, P.-J.: „De la capacité politique des classes ouvrières", Parizo, Lacroix & Co, 1868, p. 327. [piednoto de Karlo Markso]

[13] Saml., p. 333. [piednoto de Karlo Markso]

*Unua eterna principo:*

„La alteco de la salajro determinas la prezon de la varoj."

Eĉ tiuj, kiuj scias absolute neniom pri politika ekonomio kaj ne scias ke la granda burĝa ekonomikisto Ricardo en sia 1817 aperinta libro *„Principoj de la politika ekonomio"* refutis tiun tradician eraron unu fojon por ĉiam, konas la rimarkindan fakton ke la angla industrio povas vendi siajn varojn je pli malalta prezo ol ia ajn alia lando, dum la salajroj en Anglio estas relative pli altaj ol en iu ajn alia lando de Eŭropo.

*Dua eterna principo:*

„La leĝo, kiu allasas koaliciojn, estas en plej alta mezuro kontraŭjura, kontraŭekonomia kaj kontraŭdiras ĉian socion kaj ĉian ordon."

Per unu vorto, „ĝi kontraŭdiras la ekonomian *rajton* je libera konkurenco".

Se la majstro estintus iom malpli ŝovinisma, tiam li demandintus sin, kiel klarigeblas ke en Anglio antaŭ kvardek jaroj oni dekretis leĝon kiu tiel kontraŭdiras la *ekonomian rajton je libera konkurenco,* kaj kiel okazas ke tiu leĝo, kiu tiom kontraŭdiras *ĉian socion kaj ĉian ordon*, en la mezuro laŭ kiu la industrio disvolviĝas kaj samtempe kun ĝi la *libera konkurenco*, ĝuste en la burĝaj ŝtatoj trudas sin kiel neceso. Li eble malkovrintus, ke tiu Rajto (kun granda R) ekzistas nur en la *ekonomikaj lernolibroj* verkitaj de la nesciaj fratoj de la burĝa politika ekonomio, en la samaj lernolibroj kiuj entenas ankaŭ perlojn kiajn jena: *„La proprieto estas la frukto de la laboro" – de aliuloj,* forgesas ili aldoni.

*Tria eterna principo:*

„Tiel, sub la preteksto elkonduki la laboristan klason el tiel nomata socia humiliĝo, oni devas komenci per kalumnii tutan klason de burĝoj: la klason de la sinjoroj, de la entreprenistoj, de la fabrikposedantoj kaj burĝoj; oni alvokos la laborantan demokration al malestimo kaj malamo kontraŭ tiuj malindaj ligo-kamaradoj de la meza klaso; oni preferos al la leĝa subpremo la batalon en komerco kaj industrio, al la ŝtatpolico la klasan antagonismon."[14]

Por bari al la laborista klaso la eliron el ĝia *socia humiliĝo,* la majstro kondamnas ĉiajn koaliciojn kiuj konstituigas la laboristan klason kiel klason, kiuj malamike kontraŭstaras la respektindan kategorion de la

[14] V.c., p. 337-338. [piednoto de Karlo Markso]

*fabrikestroj, entreprenistoj, burĝoj*, tiun kategorion kiu certe, kiel Prudono, preferas la *ŝtatpolicon al la klasa antagonismo*. Por ŝirmi tiun respektindan klason kontraŭ ĉia malagrablaĵo, la bona Prudono rekomendas al la laboristoj ĝis la apero de la mutualisma socio la „liberecon aŭ konkurencon" kiuj, „malgraŭ iliaj grandaj malbonaĵoj" tamen konsistigas „nian solan garantion".[15]

La majstro predikis la indiferentismon sur ekonomia kampo, por ŝirmi la *liberecon aŭ burĝan konkurencon*, nian solan garantion; la disĉiploj predikas la indiferentismon sur politika kampo por ŝirmi la burĝan liberecon, sian solan garantion. Se la unuaj kristanoj, kiuj ankaŭ predikis la politikan indiferentismon, bezonis la fortan manon de imperiestro por transformiĝi el subprematoj en subpremantojn, la modernaj apostoloj de la politika indiferentismo tute ne kredas ke iliaj eternaj principoj trudas al ili la sindetenon je ĉimondaj ĝuoj kaj je pereemaj privilegioj de la burĝa socio. Ni devas tamen agnoski ke ili eltenas la 14 aŭ 16 laborhorojn, kiuj pezas sur la fabriklaboristoj, kun stoikeco inda je la kristanaj martiroj.

Londono, januaro 1873

*Karlo Markso*

[15]V.c., p. 334. [piednoto de Karlo Markso.]

# Karlo Markso; Frederiko Engelso: Postuloj de la Komunista Partio en Germanio

Laŭ Karl Marx/Friedrich Engels: Werke, volumo 5, p. 3 - 5, Dietz Verlag, Berlino (GDR), 1971, en la reta versio de
http://www.mlwerke.de/me/me05/me05_003.html

Verkita inter la 21-a kaj 29-a de marto 1848.
Presita kiel flugfolio ĉirkaŭ la 30-a de marto 1848 en Parizo kaj antaŭ la 10-a de septembro 1848 en Kolonjo.
*Laŭ la kolonja flugfolio.*

„Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!”

1. La tuta Germanio estas deklarita unueca, nedividebla respubliko.

2. Ĉiu germano kiu estas 21-jara, estas elektanto kaj elektebla, kondiĉe ke li ne suferis krimpunon.

3. La popolreprezentantoj estas salajrataj, por ke ankaŭ la laboristo povu sidi en la parlamento de la germana popolo.

4. Ĝenerala popolarmado. La armeoj estas estonte samtempe laboristarmeoj, tiel ke la armeo ne nur, kiel antaŭe, konsumas, sed produktas eĉ pli ol sumas ĝiaj entretenkostoj.
Tio estas krome rimedo por organizado de la laboro.

5. La justeco estas senpaga.

6. Ĉiuj feŭdaj ŝarĝoj, ĉiuj liveradoj, servuto, dekonaĵo[16] ktp, kiuj ĝis nun pezas sur la kampara popolo, estas sen ajna kondiĉo nuligitaj.

7. La princaj kaj aliaj feŭdaj bienoj, ĉiuj minejoj, subteraj kaj subĉielaj ktp, estas transformitaj en ŝtatproprieton. En tiuj bienoj la kampkulturo estas farata grandskale kaj per la plej modernaj rimedoj de la scienco profite al la

[16]En la originalo: Abgaben, Fronden, Zehnten. -vl

tuta socio[17].

8. La hipotekoj sur la terkulturistaj bienoj estas deklaritaj ŝtatproprieto. La interezoj por tiuj hipotekoj estas pagataj de la terkulturistoj al la ŝtato.

9. En la regionoj kie la farmado estas evoluinta, la grundrento aŭ la farmmono estas pagata kiel imposto al la ŝtato.

Ĉiuj ĉi sub 6,, 7, 8 kaj 9 indikitaj disponoj estas faritaj por malpliigi publikajn kaj aliajn ŝarĝojn de la terkulturistoj kaj malgrandaj farmistoj, sen malpliigi la rimedojn necesajn por kovri la ŝtatajn kostojn kaj sen endenaĝerigi la produktadon mem.

La grundproprietulo mem, kiu estas nek terkulturisto nek farmisto, tute ne partoprenas en la produktado. Lia konsumado estas pro tio nura misuzo.

10. Ĉiujn privatajn bankojn anstataŭas ŝtata banko, kies papero havas leĝan kurzon.

Tiu ĉi dispono ebligas reguligi la kreditaferojn en la intereso de la *tuta* popolo kaj per tio subfosas la regadon de la grandaj monuloj. Per tio ke ĝi iom post iom anstataŭigas oron kaj arĝenton per papermono, ĝi malpli kostigas la nemalhaveblan instrumenton de la civitana cirkulado, la ĝeneralan interŝanĝrimedon, kaj permesas efikigi la monon kaj arĝenton al la ekstero. Tiu ĉi dispono estas fine necesa por ligi la interesojn de la konservativaj burĝoj al la revolucio.

11. Ĉiujn transportilojn: fervojojn, kanalojn, vaporŝipojn, vojojn, postenojn ktp la ŝtato prenas en siajn manojn. Ili estas transformitaj en ŝtatproprieton kaj senpage disponigataj al la senrimeda klaso.

12. En la salajrado de ĉiuj ŝtatoficistoj okazas neniu alia diferenco ol tiu ke tiuj *kun* familio, do kun pli da bezonoj, ricevas ankaŭ pli altan salajron ol la ceteraj.

13. Kompleta disigo de la eklezio disde la ŝtato. La klerikoj de ĉiuj konfesioj estas salajrataj nur de sia libervola komunumo.

14. Limigo de la heredojrato.

[17] Laŭlitere: „la tutaĵo”. -vl

15. Enkonduko de forte progresaj impostoj kaj forigo de konsumimpostoj.

16. Starigo de naciaj laborejoj. La ŝtato garantias al ĉiuj laboristoj ilian ekzistadon kaj prizorgas tiujn kiuj ne kapablas labori.

17. Ĝenerala, senpaga popoledukado.
Estas en la intereso de la germana proletaro, de la etburĝaro kaj kamparanaro, labori per ĉia energio por trudi la supre menciitajn disponojn. Ĉar nur per ilia realigo la milionoj, kiuj ĝis nun en Germanio estas ekspluatataj de malgranda nombro kaj kiujn oni provos plu teni subpremataj, povas atingi sian rajton kaj tiun potencon kiu rajte apartenas al ili kiel la produktantoj de ĉia riĉaĵo.

*La komitato:*
*Karl Marx* - *Karl Schapper* - *H. Bauer* - *F. Engels*
*J. Moll* - *W. Wolff*

# Frederiko Engelso: Kontribuo de la laboro al la homiĝo de la simio

Tiu ĉi verketo estas parto de la kolektaĵo *Dialektiko de la naturo*. Tiu kolektaĵo estas baza verko de marksismo, en kiu Engelso donas dialektikan-materiisman ĝeneraligon de la plej gravaj atingoj de la natursciencoj meze de la 19-a jarcento, kiu plu evoluigas la dialektikon kaj kritike analizas la metafizikajn kaj idealismajn konceptojn en la natursciencoj.
Laŭ: Karl Marx/Friedrich Engels – Werke. (Karl) Dietz Verlag, Berlino, vol. 20, Berlino (GDR), 1962, „Dialektik der Natur", p. 444-455, en la formo rete prezentita en http://www.mlwerke.de/me/me20/me20_444.html

La laboro estas la fonto de ĉia riĉaĵo, diras la politikaj ekonomikistoj. Ĝi estas tia – apud la naturo, kiu liveras al ĝi la materialon, kiun ĝi transformas en riĉaĵon. Sed ĝi estas ankoraŭ senfine pli ol tio. Ĝi estas la unua bazkondiĉo de ĉia homa vivo, kaj pli precize en tia grado ke ni devas diri en certa senco: Ĝi kreis la homon mem.

Antaŭ pluraj centmiloj da jaroj, dum ankoraŭ ne certe difinebla parto de tiu tera periodo, kiun la geologoj nomas la terciaran, supozeble ĉe ties fino, vivis ie en la varmega terzono – verŝajne sur granda mondparto, nun sinkinta sur la fundon de la Hinda Oceano – aro da homsimilaj simioj aparte alte evoluinta. Darvino donis al ni proksimuman priskribon de tiuj niaj antaŭuloj. Ili estis komplete harkovritaj, havis barbojn kaj pintajn orelojn kaj vivis are sur arboj.

Supozeble instigitaj unue de sia vivmaniero, kiu donis dum grimpado al la manoj aliajn taskojn ol al la piedoj, tiuj simioj komencis sur ebena tero malkutimiĝi la kunhelpon de la manoj ĉe irado kaj adopti pli kaj pli rektan iradon. Per tio *la decida paŝo estis farita por la transiro de simio al homo*.

Ĉiuj ankoraŭ nun vivantaj homsimilaj simioj povas stari rekte kaj moviĝi nur per ambaŭ piedoj. Sed nur se necese kaj ekstreme mallerte. Ilia natura irado okazas en duonrekta pozicio kaj inkludas la uzadon de la manoj. La plej multaj apogas la ostetojn de la pugno sur la teron kaj trasvingas la korpon kun entiritaj gamboj inter la longaj brakoj, kiel lamulo kiu marŝas sur lambastonoj. Entute ni povas observi ĉe la simioj ĉiujn transirajn ŝtupojn de kvarpieda irado ĝis dupieda irado ankoraŭ nun. Sed ĉe neniu el ili la lasta fariĝis pli ol escepta helpilo.

Se la rekta irado ĉe niaj plenharaj antaŭuloj devis fariĝi unue regulo kaj

kun la tempo neceso, tiam tio kondiĉas ke la manoj ricevis intertempe pli kaj pli da aliaj taskoj. Ankaŭ ĉe la simioj regas jam certa divido de la uzado de mano kaj piedo. La mano estas bezonata, kiel jam menciite, dum grimpado alimaniere ol la piedo. Ĝi servas prefere por plukado kaj tenado de nutraĵo, kiel okazas jam ĉe malaltaj mamuloj per la antaŭaj piedoj. Per ili kelkaj simioj konstruas al si nestojn en la arboj aŭ eĉ, kiel la ĉimpanzo, tegmentojn inter la branĉoj kiel protekto kontraŭ malbona vetero. Ili kaptas per ili bastonojn por defendo kontraŭ malamikoj aŭ bombas tiujn per fruktoj kaj ŝtonoj. Ili plenumas per ili en kaptiteco certan nombron da agadoj kiujn ili kopiis de la homo. Sed ĝuste ĉi tie montriĝas, kiom grandas la distanco inter la neevoluinta mano de eĉ la plej homsimilaj simioj kaj la hommano alte elformita de la laboro tra centmiloj da jaroj. La nombro kaj ĝenerala dispozicio de la ostoj kaj muskoloj kongruas ĉe ambaŭ; sed la mano de la plej malalta sovaĝulo povas plenumi centojn da faroj kiujn nenia simimano kapablas imiti. Nenia simimano produktis iam ajn la plej krudan ŝtontranĉilon.

La faroj, al kiuj niaj antaŭuloj en transiro de simio al homo dum multaj jarmiloj iom post iom lernis adapti sian manon, povis do esti komence nur tre simplaj. La plej malaltaj sovaĝuloj, eĉ tiuj, ĉe kiuj supozeblas refalo en pli bestsimilan staton kun samtempa korpa retroformiĝo, staras daŭre multe pli alte al tiuj transiraj kreitaĵoj. Ĝis kiam la unua ŝtono estis per homa mano transformita al tranĉilo, pasis eble tempospacoj, kompare kun kiuj la de ni konata historia tempo aperas sensignifa. Sed la decida paŝo estis farita: *La mano estis liberigita* kaj povis nun akiri ĉiam novajn lertaĵojn, kaj la pli granda fleksiĝemo akirita per ĝi herediĝis kaj multiĝis de generacio al generacio.

Tiel la mano estas ne nur la organo de la laboro, *ĝi estas ankaŭ ties produkto*. Nur per laboro, per adaptiĝo al ĉiam novaj faroj, per heredo de la per tio akirita aparta elformiĝo de la muskoloj, ligamentoj, kaj en pli longaj tempoj ankaŭ de la ostoj, kaj per ĉiam denova aplikado de tiu heredita fajnigo al novaj, ĉiam pli komplikaj faroj la homa mano akiris tiun altan gradon de perfekteco, je kiu ĝi povis elsorĉi Rafaelajn pentraĵojn, Torvaldsenajn statuojn, Paganinan muzikon.

Sed la mano ne estis sola. Ĝi estis nur unuopa membro de tuta, plej kompleksa organismo. Kaj kio utilis al la mano, utilis ankaŭ al la tuta korpo, en kies servo ĝi laboris – kaj tio en duobla maniero.

Unue, sekve al la leĝo de korelativeco, kiel Darvino nomis ĝin. Laŭ tiu leĝo, certaj formoj de unuopaj partoj de organika estaĵo estas ĉiam ligitaj al aliaj partoj kiuj ŝajne tute ne havas ian rilaton kun ili. Tiel, ĉiuj animaloj,

kiuj posedas ruĝajn sangĉelojn sen ĉelkerno kaj kies postkranio estas ligita per du artikaĵoj (kondiloj), havas senescepte ankaŭ laktoglandojn por suĉigi la idojn. Tiel, ĉe mamuloj fenditaj hufoj estas regule ligitaj kun plureca stomako por remaĉado. Ŝanĝoj de certaj formoj sekvigas ŝanĝojn de la formo de aliaj korpopartoj, sen ke ni povas klarigi la interligitecon. Tute blankaj katoj kun bluaj okuloj estas ĉiam, aŭ preskaŭ ĉiam, surdaj. La iompostioma fajniĝo de la hommano kaj la sampaŝa formiĝo de la piedo por rekta irado sendube retroefikis ankaŭ per tia korelativeco al aliaj partoj de la organismo. Sed tiu influo estas ankoraŭ ege tro malmulte esplorita ol ke ni povu fari pli ol ĝenerale konstati ĝin.

Multe pli gravas la rekta, pruvebla retroefiko de la evoluo de la mano al la cetera organismo. Kiel jam dirite, niaj simiaj antaŭuloj estis sociemaj; estas evidente neebla devenigi la homon, la plej socieman de ĉiuj animaloj, el nesociema plej proksima antaŭulo. La regado super la naturo, komencanta kun la elformiĝo de la mano, kun la laboro, plilarĝigis kun ĉiu nova progreso la horizonton de la homo. Ĉe la naturobjektoj li malkovris senĉese novajn, ĝis tiam nekonatajn ecojn. Aliflanke la elformiĝo de la laboro nepre kontribuis al plia kuniĝo de la socianoj, per tio ke ĝi multigis la kazojn de reciproka subteno, de komuna agado kaj klarigis la konscion pri la utileco de tiu kunagado por ĉiu unuopulo. Mallonge, la fariĝantaj homoj alvenis al tio, ke ili *havis ion por diri* unu al la alia. La bezono kreis sian organon: La neevoluinta laringo de la simio aliformiĝis malrapide sed certe, per modulado por ĉiam pli alta modulado, kaj la buŝorganoj lernis iom post iom elparoli unu artikulaciitan literon post la alia.

Ke tiu klarigo de la estiĝo de la lingvo el kaj kun la laboro esta la sole ĝusta, tion pruvas la komparo kun la bestoj. La malmulton kiun tiuj, eĉ la plej alte evoluintaj, havas por komuniki, tion ili povas komuniki ankaŭ sen artikulaciita lingvo. En naturstato nenia besto sentas kiel mankon la fakton ke ĝi ne povas paroli aŭ kompreni homan lingvon. Tute alie, se ĝi estas malsovaĝigita fare de la homo. Hundo kaj ĉevalo akiris en kontakto kun la homo tiom fajnan orelon por artikulaciita lingvo, ke ili povas facile kompreni ĉian lingvon ĝis atingo de ilia imaghorizonto. Ili krome akiris al si la kapablon je sentoj, kiel fideleco al homoj, dankemo ktp, kiuj antaŭe estis al ili fremdaj; kaj tiu, kiu multe rilatis kun tiaj animaloj, povas apenaŭ rifuzi la konvinkon ke ekzistas sufiĉe da kazoj kie ili nun sentas la nekapablon paroli kiel mankon, kiu bedaŭrinde jam ne forigeblas pro ilia en certa direkto multe tro specialiĝinta voĉorgano. Sed kie la organo ekzistas, tie ankaŭ tiu nekapablo foriĝas ene de certaj limoj. La buŝorganoj de la birdoj certe plej malsamas ol tiuj de la homo, kaj tamen birdoj estas la solaj bestoj kiuj lernas paroli; kaj la birdo kun la plej aĉa voĉo, la papago, parolas plej

bone. Oni ne diru ke ĝi ne komprenas kion ĝi diras. Tamen ĝi certe pro pura plezuro je parolado kaj en socio kun homoj dum horoj gurdbabile ripetas sian tutan vorttrezoron. Sed en la limoj de ĝia imagkapablo ĝi povas ankaŭ lerni kompreni kion ĝi diras. Oni instruu al papago insultvortojn tiel ke ĝi ricevas imagon pri ilia signifo (ĉefa amuzo de ŝipanoj revelantaj el varmaj landoj); oni incitu ĝin, kaj oni baldaŭ trovos ke ĝi sĉias ĝuste valorigi siajn insultvortojn same kiel berlina legomvendistino. Same ĉe almozpetado pri frandaĵoj.

Laboro unue, poste iom post iom kun ĝi la lingvo – tio estas la du plej esencaj impulsoj, sub kies influo la cerbo de simio transiris iom post iom en tiun multe pli grandan kaj perfektan de homo. Sed kun la pliperfektiĝo de la cerbo iris man-en-mane la pliperfektiĝo de ĝiaj plej proksimaj instrumentoj, la sensorganoj. Kiel jam la lingvo en sia iompostioma elformiĝo estas nepre akompanata de responda fajniĝo de la aŭdorgano, tiel la elformiĝo de la cerbo entute de tiuj de ĉiuj sensoj. La aglo vidas multe pli malproksimen ol la homo, sed la homa okulo vidas multe pli ĉe la aĵoj ol tiu de la aglo. La hundo havas multe pli fajnan flarnazon ol la homo, sed ĝi distingas eĉ ne la centonan parton da odoroj kiuj estas por li certaj trajtoj de diversaj aĵoj. Kaj la palpsenso, kiu ekzistas ĉe la simio apenaŭ en siaj plej krudaj komencoj, elformiĝis nur per la hommano mem, per la laboro.

La retroefiko de la evoluo de la cerbo kaj de ties servantaj sensoj, de la pli kaj pli klara konscio, abstrakt- kaj konklud-kapablo al laboro kaj lingvo donis al ambaŭ ĉiam novan instigon al pluevoluo; al pluevoluo kiu ja ne finiĝis ekde kiam la homo estis definitive disiĝinta de la simio, sed kiu de tiam ĉe diversaj popoloj kaj dum diversaj epokoj diverse laŭ grado kaj direkto, ie kaj tie eĉ interrompite de loka kaj tempa malprogreso, entute faris gigantajn progresojn; unuflanke ĝi estis ege akcelata, aliflanke gvidata en certan direkton de elemento nove alveninta kun la apero de la preta homo – la *socio.*

Centmiloj da jaroj – en la historio de la Tero ne pli ol sekundo en homvivo[18] – certe pasis, antaŭ ol el la arbogrimpa simiaro elfariĝis socio de homoj. Sed fine ĝi ekzistis. Kaj kion ni ree trovas kiel la decidan diferencon inter simiaro kaj homsocio? *La laboron.* La simiaro kontentiĝis paŝtiĝi en sia nutraĵregiono kiu estis al ĝi asignita de la geografia situo aŭ de la rezistado de najbaraj aroj; ĝi entreprenis migradojn kaj batalojn por akiri novan nutraĵregionon, sed ĝi estis malkapabla eltiri el la nutraĵregiono pli ol

[18]Unuaranga aŭtoritato en tiu rilato, Sir W. Thomson, elkalkulis, ke *ne multe pli ol cent milionoj da jaroj* povas esti pasintaj ekde la tempo kiam la Tero estis tiom malvarmiĝinta ke plantoj kaj animaloj povis vivi sur ĝi.

tion kion la naturo ofertis, krom ke ĝi nekonscie fekundigis ĝin per siaj defalaĵoj. Ekde kiam ĉiuj nutraĵregionoj estis okupataj, jam ne povis okazi pliiĝo de la simia loĝantaro; la nombro de la animaloj povis en plej bona okazo resti sama. Sed ĉe ĉiuj animaloj okazas altgrada malŝparado de nutraĵo, kaj krome mortigo de la nutraĵ-rekreskado. La lupo ne domaĝas, kiel la ĉasisto, la kapreolinon kiu sekvajare devus liveri al ĝi la kapreoletojn; la kaproj en Grekujo, kiuj formanĝas la junan vepraĵon, antaŭ ol ĝi elkreskas, kalvigis ĉiujn montojn de la lando. Tiu „troekspluatado" de la bestoj ludas gravan rolon ĉe la transformiĝo de la specioj, per tio ke ĝi devigas ilin adaptiĝi al alia ol la kutima nutraĵo, per kio ilia sango akiras alian konsiston kaj la tuta korpa konstitucio fariĝas iom post iom alia, dum la jam fiksiĝintaj specioj formortas. Ne dubeblas ke tiu troekspluatado ege kontribuis al la homiĝo de niaj antaŭuloj. Ĉe simia raso kiu estis ege avancinta je inteligento kaj adaptiĝemo, kompare kun ĉiuj aliaj, ĝi devis konduki al tio ke la nombro de nutraj plantoj pli kaj pli etendiĝis, ke pli kaj pli da manĝeblaj partoj de la nutraj plantoj estis manĝataj, mallonge, ke la nutraĵo fariĝis ĉiam pli multspeca kaj kun ĝi la substancoj kiuj eniris la korpon, la ĥemiaj kondiĉoj de la homiĝo. Sed ĉio ĉi ankoraŭ ne estis vera laboro. La laboro komenciĝas per produktado de instrumentoj. Kaj kio estas la plej malnovaj instrumentoj kiujn ni trovas? La plej malnovaj, se juĝi laŭ la trovitaj heredaĵoj de antaŭhistoriaj homoj kaj laŭ la vivmaniero de la plej fruaj historiaj popoloj kiel de la plej krudaj nunaj sovaĝuloj? Instrumentoj de ĉasado kaj de fiŝkaptado, la unuaj samtempe armiloj. Sed ĉasado kaj fiŝkaptado antaŭkondiĉas la transiron de nura plantnutriĝo al kunmanĝado de viando, kaj jen ni havas rean paŝon al homiĝo. La viandnutraĵo entenis en preskaŭ preta stato la plej esencajn substancojn kiujn la korpo bezonas por sia metabolo, ĝi mallongigis per la digesto la tempon de la ceteraj vegetaĵaj procezoj en la korpo, kiuj respondas al planta vivo, kaj per tio gajnis pli da tempo, pli da substancoj kaj pli da emo al la envere animala vivo. Kaj ju pli la fariĝanta homo malproksimiĝis de la planto, des pli li altiĝis ankaŭ super la besto. Kiel la kutimigo al plantnutraĵo apud viando faras la sovaĝajn katojn kaj hundojn servistoj de la homo, tiel la kutimiĝo al vianda nutraĵo apud planta esence kontribuis doni al la fariĝanta homo korpoforton kaj memstarecon. Sed plej esence estis la efiko de la viandnutraĵo al la cerbo, al kiu nun la substancoj necesaj por ĝia nutriĝo kaj disvolviĝo alfluis pli abunde ol antaŭe, kaj kiu pro tio povis de generacio al generacio pli rapide kaj pli perfektiĝe elformiĝi. Kun permeso de la sinjoroj vegetaranoj, la homo ne estiĝis sen vianda nutraĵo, kaj eĉ se la vianda nutraĵo kondukis ĉe ĉiuj al ni konataj popoloj iutempe iam al kanibalismo (la antaŭuloj de la berlinanoj, la veletaboj aŭ vilcoj, manĝis siajn gepatrojn ankoraŭ en la 10-a jarcento, tio jam ne povas ĝeni nin hodiaŭ.

La vianda nutraĵo kondukis al du novaj decide gravaj progresoj: al utiligo de fajro kaj al malsovaĝigo de bestoj. La unua mallongigis la digestprocezon ankoraŭ pli, per tio ke ĝi alkondukis la manĝaĵon por tiel diri jam duone digestita al la buŝo, la dua pli abundigis la viandan nutraĵon per tio ke ĝi malfermis apud la ĉasado novan pli regulan akirfonton por tio, kaj krome liveris per lakto kaj ties produktaĵoj novan, nutraĵon je substanckonsisto almenaŭ samvaloran kun la viando. Tiel ambaŭ fariĝis jam rekte novaj emancipiĝrimedoj por la homoj; pritrakti iliajn nerektajn efikojn kondukus nin ĉi tie tro malproksimen, kvankam ili estis alte gravaj por la evoluo de la homo kaj de la socio.

Kiel la homo lernis manĝi ĉion manĝeblan, tiel li lernis ankaŭ vivi en ĉiu klimato. Li disvastiĝis tra la tuta priloĝebla Tero, li, la sola animalo kiu posedis por tio la potencon en si mem. La aliaj animaloj, kiuj kutimiĝis al ĉiuj klimatoj, lernis tion ne el si mem, nur sekvante la homon: dombestoj kaj fiinsektoj. Kaj la transiro el la egalece varmega klimato de la prapatrujo en pli malvarmajn regionojn, kie la jaro dividiĝas en someron kaj vintron, kreis novajn bezonojn: loĝado kaj vestado protekte kontraŭ la malvarmo kaj malsekeco, novaj laborkampoj kaj per tio novaj okupiĝoj, kiuj ĉiam pli malproksimigis la homon de la besto.

Per la kunagado de mano, voĉorganoj kaj cerbo ne nur ĉe ĉiu individuo, sed ankaŭ en la socio, la homoj akiris la kapablon plenumi ĉiam pli komplikajn farojn, meti al si ĉiam pli altajn celojn kaj atingi ilin. La laboro mem fariĝis de generacio al generacio alia, pli perfekta, pli multflanka. Al ĉasado kaj bestbredado aliĝis la kampkulturado, al tiu ŝpinado kaj teksado, prilaborado de metaloj, potfarado, ŝipveturado. Apud komerco kaj metio aperis fine arto kaj scienco, el triboj fariĝis nacioj kaj ŝtatoj. Juro kaj politiko disvolviĝis, kaj kun ili la fantasta spegulbildo de la homaj aferoj en la homa kapo: la religio. Antaŭ ĉiuj ĉi formitaĵoj, kiuj prezentiĝis unue kiel produktoj de la kapo kaj kiuj ŝajnis regi la homajn sociojn, la pli modestaj produktaĵoj de la laboranta mano fariĝis duaranga; kaj tio des pli ke la kapo plananta la laboron jam sur tre frua evoluŝtupo de la socio (ekz-e jam en la simpla familio) povis plenumigi la planitan laboron per aliaj manoj ol la siaj. La la kapo, al la evoluo kaj agado de la cerbo, oni atribuis ĉian meriton je la rapide progresanta civilizacio; la homoj kutimiĝis klarigi al si sian agadon el sia pensado anstataŭ el siaj bezonoj (kiuj tamen en la kapo respeguliĝas, atingas konscion) – kaj tiel estiĝis kun la tempo tiu idealisma mondrigardo, kiu nome depost la subiro de la antikva mondo regis la kapojn. Ĝi regas ankoraŭ tiom, ke eĉ la materiismaj naturesploristoj de la darvina skolo ankoraŭ ne povas fari al si klaran ideon pri la estiĝo de la homo, ĉar sub tiu ideologia influo ili ne povas ekkoni la rolon kiun la laboro

ludis ĉe tio.

La bestoj, kiel jam aludite, ŝanĝas per sia agado la eksteran naturon same, kvankam ne sammezure kiel la homo, kaj tiuj de ili faritaj ŝanĝoj de la medio reefikas, kiel ni vidis, siavice al siaj kaŭzintoj. Ĉar en la naturo nenio okazas izolite. Ĉio efikas al la alia kaj inverse, kaj plej ofte estas la forgeso de tiu ĉiuflanka moviĝo kaj reciproka efiko, kiu malhelpas niajn naturesploristojn vidi klare ĉe la plej simplaj aferoj. Ni vidis, kiel la kaprinoj malhelpas la rearbariĝon de Grekujo; en Sankt-Heleno la kaproj kaj porkoj, alterigitaj de la unuaj alvelintoj, sukcesis preskaŭ tute ekstermi la malnovan vegetaĵaron, kaj tiel preparis la grundon sur kiuj la plantoj, alkondukitaj de postaj ŝipistoj kaj setlantoj povis disvastiĝi. Sed se la animaloj faras konstantan efikon sur sia medio, tio okazas neintence kaj estas, por la bestoj mem, io hazarda. Sed ju pli la homoj distanciĝas de la besto, des pli ilia efiko sur la naturo alprenas la karakteron de antaŭpensita, laŭplana, al precizaj, antaŭe konataj celoj direktita ago. La besto neniigas la vegetaĵaron de regiono sen scii kion ĝi faras. La homo neniigas ĝin por semi en la liberigitan grundon kampfruktojn aŭ planti arbojn kaj vinberplantojn, pri kiuj li scias ke ili alportos al li multoblon de la semitaĵo. Li transportas utilajn plantojn kaj dombestojn de unu lando en la alian kaj tiel ŝanĝas la vegetaĵaron kaj la bestaron de tutaj mondpartoj. Eĉ pli. Per artefarita bredado plantoj kiel bestoj estas sub la mano de la homo ŝanĝataj en maniero ke ili ne estas rekoneblaj. La sovaĝaj plantoj, de kiuj devenas niaj grenspecoj, estas ankoraŭ vane serĉataj. De kiu sovaĝa besto niaj hundoj, kiuj eĉ inter si estas tiom diversaj, aŭ niaj same diversaj ĉevalrasoj devenas, estas daŭre disputata.

Estas cetere memkomprenebla, ke ni ne kapricas malagnoski al la bestoj la kapablon de laŭplana, antaŭpensita agmaniero. Male. Laŭplana agmaniero ekzistas ĝerme jam ĉie, kie protoplasmo, vivanta albumino ekzistas kaj reagas, t.e. plenumas certajn, eĉ se ege simplajn movojn kiel sekvon de certaj ekscitoj deekstere. Tia reago okazas, kie ankoraŭ nenia ĉelo, kaj multe malpli nervoĉelo, ekzistas. La maniero, laŭ kiu insektmanĝaj plantoj kaptas sian predon, aperas ankaŭ iarilate kiel laŭplana, kvankam komplete senkonscie. Ĉe la animaloj, la kapablo de konscia, laŭplana ago evoluas proporcie kun la evoluo de la nervosistemo kaj atingas ĉe la mamuloj jam altan ŝtupon. Ĉe la angla vulpoĉasado oni povas ĉiutage observi, kiel precize la vulpo scias utiligi sian grandan lokkonon por eskapi al siaj persekutantoj, kaj kiel bone ĝi konas kaj uzas ĉiujn terenajn avantaĝojn kiuj interrompas ĝian spuron. Ĉe niaj per la interrilato kun homoj pli alte evoluintaj dombestoj oni povas ĉiutage observi petolajn ruzaĵojn kiuj staras tute sur la sama ŝtupo kun tiuj de homaj infanoj. Ĉar kiel

la evoluhistorio de la homa ĝermo en la patrina ventro prezentas nur mallongigitan ripetaĵon de la milionjara korpa evoluhistorio de niaj animalaj antaŭuloj, ekde la vermo, tiel la spirita evoluo de la homa infano, ankoraŭ pli mallongigitan ripetaĵon de la intelekta evoluo de la samaj antaŭuloj, almenaŭ de la pli postaj. Sed ĉia laŭplana ago de ĉiuj bestoj ne sukcesis surmeti al la Tero la stampon de sia volo. Por tio necesis la homo.

Mallonge, la besto uzas la eksteran naturon nur kaj alportas ŝanĝojn en ĝi simple per sia ĉeesto; la homo utiligas ĝin per siaj ŝanĝoj, *regas*[19] ĝin. Kaj tio estas la lasta, esenca diferenco de la homo disde la ceteraj animaloj, kaj estas ree la laboro kiu kaŭzas tiun diferencon.[20]

Tamen ni ne tro flatu nin per niaj venkoj super la naturo. Por ĉiu tia venko la naturo venĝas sin kontraŭ ni. Ĉiu venko havas unuavice ja la sekvojn kiujn ni celis, sed dua- kaj tria-vice ĝi havas tute aliajn, ne antaŭviditajn efikojn, kiuj tro ofte nuligas tiujn unuajn sekvojn. La homoj kiuj en Mezopotamio, Grekujo, Malgrand-Azio kaj aliie ekstermis la arbarojn por gajni fruktodonan grundon, ne elrevis ke ili per tio estigis la kaŭzon por la nuna dezerteco de tiuj landoj, per tio ke ili forprenis de ili kun la arbaroj la kolektiĝajn centrojn kaj konservujojn de malsekaĵo. La italoj de la Alpoj, kiam ili foruzis la abioarbarojn – sur la norda flanko de la montaro zorge flegatajn –, ne pensis ke ili per tio forigis la bazon de la paŝtado; ili pensis eĉ malpli ke ili per tio forigis la akvon de siaj montfontoj por la plej granda parto de la jaro, por ke tiuj dum la pluvsezono povu sendi des pli furiozajn inundofluojn super la ebenaĵon. La disvastigantoj de la terpomo en Eŭropo ne sciis ke ili kun la farunecaj tuberoj disvastigis samtempe la skrofolmalsanon. Kaj tiel ni estas ĉiupaŝe memorigataj ke ni tute ne regas la naturon, kiel konkeranto regas fremdan popolon, kiel iu, kiu staras ekster la naturo – sed ke ni karne kaj sange kaj cerbe apartenas al ĝi kaj staras meze en ĝi, kaj ke nia tuta regado super ĝi konsistas en tio, privilegie antaŭ ĉiuj aliaj kreitaĵoj ekkoni ĝiajn leĝojn kaj povi ĝuste apliki ilin.

Kaj efektive ni lernas ĉiutage pli ĝuste kompreni ĝiajn leĝojn kaj ekkoni la proksimajn kaj pli malproksimajn postsekvojn de niaj intervenoj en la tradician iradon de la naturo. Nome ekde la gigantaj progresoj de la naturscienco en tiu ĉi jarcento ni estas pli kaj pli kapabligitaj lerni koni ankaŭ la pli malproksimajn naturajn postsekvojn almenaŭ de niaj plej kutimaj produktad-agadoj kaj per tio regi. Sed ju pli tio okazas, des pli la homoj ne nur ree sentos sin, sed ankaŭ scios sin, unuecaj kun la naturo, kaj des pli malebla fariĝas tiu kontraŭsenca kaj kontraŭnatura imago de kon-

[19]En la germana originalo: *beherrscht* (regas, dominas). -vl
[20]Ĉe la rando de la manuskripto estas krajone menciita: „nobligo”.

traŭdiro inter menso kaj materio, homo kaj naturo, animo kaj korpo, tia kia ĝi estiĝis ekde la pereo de la klasika antikveco en Eŭropo kaj ricevis en la kristaneco sian plej altan formiĝon.

Sed se necesis jam la laboro de jarmiloj, ĝis kiam ni pli-malpli lernis kalkuli la pli malproksimajn *naturajn* efikojn sur niaj agoj direktitaj al produktado, tio estis des pli malfacila rilate la pli malproksimajn *sociajn efikojn* de tiuj agoj. Ni menciis la terpomon kaj en ties sekvo la disvastiĝon de la skrofolo. Sed kio estas la skrofolo kontraŭ la efikoj, kiujn havis la reduktado de la laboristoj al terpom-nutraĵo sur la vivkondiĉoj de la popolamasoj de tutaj landoj, kontraŭ la malsatmizero, kiu 1847 sekve al la terpommalsano trafis Irlandon kaj ĵetis milionon da terpommanĝantaj kaj preskaŭ nur terpommanĝantaj irlandanoj sub la teron kaj du milionojn trans la maron? Kiam la araboj lernis distili alkoholon, ili eĉ ne sonĝe ekpensis, ke per tio ili kreis unu el la ĉefaj instrumentoj per kiuj la praloĝantoj de la tiam ankoraŭ ne malkovrita Ameriko estis elmondigotaj. Kaj kiam poste Kolumbo malkovris tiun Amerikon, li ne sciis ke per tio li revivigis la en Eŭropo delonge superitan sklavecon kaj metis la fundamenton por la nigrulkomerco. La viroj kiuj, en la deksepa kaj dekoka jarcento, laboris pri produktado de la vapormaŝino, ne pensis ke ili pretigas la instrumenton kiu pli ol ĉia alia revoluciigos la sociajn kondiĉojn de la tuta mondo kaj nome en Eŭropo per koncentriĝo de la riĉaĵo sur unu flanko de la malplimulto, kaj la senhavecon surflanke de la giganta plimulto, donis unue al la burĝaro la socian kaj politikan regadon, sed poste produktos klasbatalon inter burĝaro kaj proletaro, kiu povas finiĝi nur per la faligo de la burĝaro kaj forigo de ĉiaj klasaj kontraŭdiroj. – Sed ankaŭ tiukampe ni iom post iom lernas, per longa, ofte akra sperto, kaj per kombinado kaj esplorado de la historia materialo, akiri klarecon pri la nerektaj, pli malproksimaj sociaj efikoj de nia produktada agado, kaj per tio ni ricevas la eblecon regi kaj reguligi ankaŭ tiujn efikojn.

Sed por plenumi tiun reguladon, por tio necesas pli ol la nura ekkono. Por tio necesas kompleta transformado de nia ĝisnuna produktadmaniero kaj kun ĝi de nia nuna tuta socia ordo.

Ĉiuj ĝisnunaj produktadmanieroj celis nur la plej proksiman, plej senperan uzefikon de la laboro. La kromaj sekvoj, aperantaj nur en posta tempo, per iompostioma ripetiĝo kaj amasiĝo, restis tute neglektitaj. La origine komuna proprieto je grundo kongruis unuflanke kun evolustato de la homoj, kiu limigis entute ilian horizonton al ĉio plej proksima, kaj aliflanke kondiĉis certan superabundon je disponebla grundo, kiu kontraŭ la eventualaj malbonaj sekvoj de tiu arbarpraa ekonomio lasis certan agmarĝenon. Se tiu superabundo de grundo estis elĉerpita, tiam pereis

ankaŭ la komuna proprieto. Sed ĉiuj pli altaj formoj de produktado antaŭenigis la dividon de la loĝantaro en diversajn klasojn kaj per tio la kontraŭdiron de regantaj kaj subpremataj klasoj; sed per tio la intereso de la reganta klaso fariĝis la pelanta elemento de produktado, se tiu ĉi ne limiĝis al la plej baza vivtenado de la subprematoj. Tio estis plej komplete plenumita en la nun en okcidenta Eŭropo reganta kapitalisma produktadmaniero. La individuaj kapitalistoj kiuj regas produktadon kaj interŝanĝon, povas zorgi nur pri la plej senpera uzefiko de siaj agoj. Ja eĉ tiu uzefiko – se temas pri la utileco de la produktata aŭ interŝanĝata artiklo – malaperas komplete en la fonon; la profito celata ĉe vendo fariĝas la sola pelilo.

La sociscienco de la burĝaro, la klasika politika ekonomio, okupiĝas precipe nur pri la rekte celataj sociaj efikoj de la homaj agoj direktitaj al produktado kaj interŝanĝo. Tio kongruas tute kun la socia organizaĵo, kies teoria esprimo ĝi estas. Kie individuaj kapitalistoj produktas kaj interŝanĝas por la senpera profito, tie unuavice insidereblas nur la plej proksimaj, plej senperaj rezultoj. Se la individua fabrikisto aŭ komercisto vendas la fabrikitan aŭ aĉetitan varon nur kun la kutima profiteto, tiam li estas kontenta, kaj li ne zorgas pri tio kio poste fariĝas la varo aŭ la aĉetanto. Same pri la naturaj efikoj de la samaj agoj. La hispanaj plantistoj en Kubo, kiuj forbruligis la arbarojn ĉe la deklivoj kaj en la cindro trovis sufiĉe da sterkaĵo por generacio de plej profitigaj kafarboj – kiom ili interesiĝis pri tio ke poste la tropikaj pluvegoj forkondukis la nun senprotektan diggrundon? Rilate la naturon kiel la socion, ĉe la nuntempa produktad-maniero oni konsideras precipe nur la unuan, plej palpeblan sukceson; kaj poste oni eĉ miras ke la pli malproksimaj postefikoj de la al tio direktitaj agoj estas tute aliaj, ofte tute kontraŭaj, ke la harmonio de postulo kaj propono transformiĝas en sian polusan malon, kiel la sinsekvo de ĉiu dekjara industria ciklo prezentas ĝin kaj kiel ankaŭ Germanio en la bankroto spertis etan antaŭludon de ĝi; ke la privata proprieto bazita sur propra laboro nepre pluevoluas al senproprieteco de la laboristoj, dum ĉia posedo koncentriĝas pli kaj pli en la manoj de nelaboristoj, ke [... Ĉi tie la manuskripto ĉesas]

*Rimarko de la tradukinto:* Bedaŭrinde mi rimarkis tro malfrue, ke tiu ĉi verketo estis jam tradukita al Esperanto, nome de Cezar (Esperanta pseŭdonomo por lia civitana nomo Hans-Georg Kaiser), jene:

http://www.marxists.org/esperanto/marxengels/1870s/ 1876junio.htm

Tamen, post komparo de la du versioj, mi konvinkiĝis, ke mia laboro ne estis vana, kaj decidis publikigi tiun ĉi mian version.

*Vilhelmo Lutermano*

# Frederiko Engelso: Principoj de komunismo

La laboraĵo de Engelso „Principoj de komunismo” estas programskizo por la *Ligo de la Komunistoj*. Pri ellaborado de programo en formo de kateĥismo oni diskutis jam antaŭ la unua liga kongreso, ĉe kiu la *Ligo de la Justuloj* nove organiziĝis kaj donis al si la nomon *Ligo de la Komunistoj* (junio 1847). En septembro 1847 la londona centra oficejo de la Ligo de la Komunistoj (Schapper, Bauer kaj Moll) sendis la skizon de „Komunista Kredkonfeso” al la rondoj kaj komunumoj de la Ligo. Tiu dokumento, kiu montris la influojn de la utopia socialismo, ne povis kontentigi Markson kaj Engelson, same ne la „fuŝe plibonigita” koncepto farita en Parizo de la „vera” socialisto Moses Hess. Dum la kunsido de la pariza distriktinstanco de la Ligo de Komunistoj la 22-an de oktobro, Engelso kritikis la skizon tre detale kaj akre kaj ricevis la taskon verki novan. Tiu baldaŭ poste verkita skizo estis la „Principoj de komunismo”.
Engelso, kiu konsideris la „Principojn de komunismo” nur kiel provizoran programskizon, esprimis en sia letero de la 23-a/24-a de novembro 1847 al Markso la ideon ke estus plej bone forlasi la arĥaisman kateĥismoformon kaj verki programon en formo de „Komunista manifesto”. La dua kongreso de la Ligo de Komunistoj (20-an de novembro ĝis 8-a de decembro 1847), dum kiu Markso kaj Engelso argumentis por la sciencaj principoj de la programo de la proleta partio, taskis ambaŭ ellabori la manifeston. Ĉe la redaktado de la „Manifesto de la komunista partio” la fondintoj de la marksismo utiligis kelkajn el la tezoj disvolvitaj en la „Principoj de komunismo”.

*1. Demando: Kio estas komunismo?*

Respondo: La komunismo estas la instruo pri la kondiĉoj de la liberigo de la proletaro.

*2. Demando: Kio estas la proletaro?*

Respondo: La proletaro estas tiu klaso de la socio, kiu tiras siajn vivrimedojn sole nur el la vendo de sia laboro[21] kaj ne el la profito de ia kapitalo; kies bona kaj malbona farto, kies vivo kaj morto, kies tuta

---

[21]En siaj unuaj verkoj Markso kaj Engelso parolis ankoraŭ pri vendo de la laboro. Poste Markso pruvis ke la laboristo vendas ne sian laboron, sed sian laborforton. Vidu pri tio la klarigojn en la enkonduko de Engelso al la noveldono de la Marksa verko „Dunglaboro kaj kapitalo”, [originale: „Lohnarbeit und Kapital”], Berlino 1891 (volumo 6 de nia eldono, paĝoj 593-599), kp ankaŭ la antaŭparolon de volumo 4, paĝo IX). – En Esperanto: Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009. -vl

ekzistado dependas de la postulo je laboro, do de la ŝanĝiĝo de bonaj kaj malbonaj komercaj tempoj, de la ŝanceliĝoj de senbrida konkurenco. La proletaro aŭ la klaso de la proletoj estas, unuvorte, la laboranta klaso de la deknaŭa jarcento.

*3. Demando: Do, ne ĉiam ekzistis proletoj?*

Respondo: Ne. Malriĉaj kaj laborantaj klasoj ĉiam ekzistis[22]; ankaŭ, la laborantaj klasoj estis plej ofte malriĉaj. Sed tiaj malriĉuloj, tiaj laboristoj, kiuj vivis en la ĵus indikitaj cirkonstancoj, do proletoj, ne ĉiam ekzistis, same kiel la konkurenco ne estis ĉiam libera kaj senbrida.

*4. Demando: Kiel estiĝis la proletaro?*

Respondo: La proletaro estiĝis per la industria revolucio, kiu okazis en la lasta duono de la antaŭa jarcento en Anglio kaj kiu poste ripetiĝis en ĉiuj civilizitaj landoj de la mondo. Tiu industria revolucio estis okazigita per la invento de la vapormaŝino, de la diversaj ŝpinmaŝinoj, de la meĥanika teksilo kaj de tuta vico da aliaj meĥanikaj aranĝoj. Tiuj maŝinoj, kiuj estis tre multekostaj kaj do akireblaj nur de grandaj kapitalistoj, ŝanĝis la tutan ĝistiaman produktadmanieron kaj forŝovis la ĝistiamajn laboristojn, per tio ke maŝinoj liveris la varojn pli malmultekoste kaj pli bone ol la laboristoj povis produkti ilin per siaj malperfektaj ŝpinradoj kaj teksiloj.

La maŝinoj liveris per tio la industrion komplete en la manojn de la grandaj kapitalistoj kaj komplete senvalorigis la etan proprieton de la laboristoj (instrumentoj, teksiloj ktp), tiel ke la kapitalistoj baldaŭ ricevis ĉion en siaj manoj kaj la laboristoj konservis nenion. Per tio, en la produktado de vestaĵŝtofoj, enkondukiĝis la fabriksistemo. – Kiam la impulso al enkonduko de maŝinaro kaj de la fabriksistemo jam estis donita, tiu sistemo tre baldaŭ aplikiĝis ankaŭ al ĉiuj ceteraj industribranĉoj, nome al la tolaĵ- kaj libro-presado, la ceramiko, la metalvar-industrio. La laboro estis ĉiam pli dividita inter la diversaj laboristoj, tiel ke la laboristo, kiu antaŭe faris tutan pecon da laboro, nun faris nur parton de tiu peco.

---

[22] Kp la rimarkon de Engelso pri la periodo de la senklasa prasocio, antaŭa al la klasa socio, en la „Manifesto de la komunista partio”. (Vidu vol. 4, paĝo 462.) – En Esperanto: Karl Marx; Friedrich Engels: „Manifesto de la Komunista Partio”, tradukita de Detlev Blanke, Progreso, Moskvo, 1991.

Tiu divido de la laboro ebligis ke la produktaĵoj livereblis pli rapide kaj pro tio pli malmultekoste. Ĝi reduktis la agadon de ĉiu laboristo al tre simpla, ĉiumomente ripetata, meĥanika man-ago, kiu fareblis ne nur same bone, sed eĉ multe pli bone de maŝino. Tiamaniere ĉiuj ĉi industribranĉoj, unu post la alia, venis sub la regadon de vaporforto, de maŝinaro kaj de la fabriksistemo, ĝuste kiel la ŝpinado kaj teksado. Sed per tio ili samtempe venis komplete en la manojn de la grandaj kapitalistoj, kaj de la laboristoj fortiriĝis ankaŭ ĉi tie la lasta resto de memstareco. Iom post iom, ekster la propradira manufakturo ankaŭ la metioj iĝis pli kaj pli sub la regado de la fabriksistemo, per tio ke ankaŭ ĉi tie grandaj kapitalistoj per starigo de grandaj laborejoj, ĉe kiuj ŝpareblas multaj kostoj kaj la laboro ankaŭ divideblas, pli kaj pli forpuŝis la malgrandajn majstrojn.

Tiel ni alvenis nun al tio ke en la civilizitaj landoj preskaŭ ĉiuj laborbranĉoj aktivas fabrikece, ke en preskaŭ ĉiuj laborbranĉoj la metio kaj la manufakturo estas elpuŝitaj de la granda industrio. – Per tio la ĝisnuna mezklaso, aparte la malgrandaj metimajstroj, estas pli kaj pli ruinigita, la antaŭa kondiĉo de la laboristoj tute revoluciita kaj du novaj klasoj kreiĝis, kiuj iom post iom forvoras ĉiujn ceterajn, nome:

1. La klaso de la grandaj kapitalistoj, kiu en ĉiuj civilizitaj landoj posedas jam nun preskaŭ ekskluzive ĉiujn vivrimedojn kaj la krudmaterialojn kaj instrumentojn (maŝinojn, fabrikojn) necesajn por produktado de la vivrimedoj. Tiu estas la klaso de la burĝoj aŭ la burĝaro.

2. La klaso de la komplete senposedaj homoj, kiuj dependas de tio ke ili vendas al la burĝoj sian laboron, por ricevi per tio la vivrimedojn necesajn por sia vivtenado. Tiu klaso nomiĝas la klaso de la proletoj aŭ la proletaro.

*5. Demando: Sub kiuj kondiĉoj okazas tiu vendo de la laboro de la proletaro al la burĝoj?*

Respondo: La laboro estas varo kiel ĉiu alia, kaj ĝia prezo estas pro tio determinata precize laŭ la samaj leĝoj kiel tiu de ĉiu alia varo. Sed la prezo de varo sub regado de la granda industrio aŭ de la libera konkurenco, kio, kiel ni vidos, estas samsignifa, mezume ĉiam egalas al la produktadkostoj de tiu varo. La prezo de la laboro estas do same egala al la produktadkostoj de la laboro.

Sed la produktadkostoj de la laboro konsistas en ĝuste tiom da vivrimedoj, kiom necesas por kapabligi la laboriston resti laborkapabla kaj do ne

elmortigi la laboristan klason. La laboristo do ricevos por sia laboro ne pli ol necesas por tiu celo; la prezo de la laboro aŭ la salajro estos do la plej malalta, la minimumo necesa por vivtenado. Sed ĉar la komercaj tempoj estas jen pli malbonaj, jen pli bonaj, li ricevos jen pli, jen malpli, ĝuste kiel la fabrikisto ricevas jen pli, jen malpli por sia varo. Sed same kiel la fabrikisto mezume de la bonaj kaj malbonaj komercaj tempoj ricevas tamen ne pli kaj ne malpli por sia varo ol siajn produktadkostojn, same la laboristo ricevos ankaŭ ne pli kaj ne malpli ol ĝuste tiun minimumon. Sed tiu ekonomia leĝo de salajro aplikiĝos des pli severe, ju pli la granda industrio regas super ĉiuj laborbranĉoj.

*6. Demando: Kiaj laboristaj klasoj ekzistis antaŭ la industria revolucio?*

Respondo: La laboristaj klasoj vivis laŭ la diversaj evoluŝtupoj de la socio en diversaj kondiĉoj kaj havis diversajn poziciojn rilate la posedantajn kaj regantajn klasojn. En la antikveco la laborantoj estis la sklavoj de la posedantoj, tiaj kiaj ili estas daŭre en multaj postrestintaj landoj kaj eĉ en la suda parto de Usono. En la mezepoko ili estis la servutuloj de la grundposedanta nobelaro, kiaj ili estas nun ankoraŭ en Hungario, Pollando kaj Ruslando. En la mezepoko kaj ĝis la industria revolucio ekzistis krome en la urboj metisubmajstroj, kiuj laboris en la servo de etburĝaj majstroj, kaj iom post iom aperis ankaŭ, kun la evoluo de la manufakturo, manufakturlaboristoj, kiuj estis dungitaj jam de pli grandaj kapitalistoj.

*7. Demando: Per kio la proleto distingiĝas de la sklavo?*

Respondo: La sklavo estas vendita unufoje por ĉiam; la proletaro devas ĉiutage kaj ĉiuhore vendi sin mem. La unuopa sklavo, proprieto de sia mastro, havas jam pro la intereso de tiu mastro certigitan ekzistadon, kiom ajn mizera ĝi povas esti; la unuopa proleto – proprieto por tiel diri de la tuta burĝaro – de kiu oni aĉetas lian laboron nur tiam kiam iu bezonas ĝin, ne havas certigitan ekzistadon. Tiu ekzistado estas certigita nur por la tuta proleta klaso. La sklavo staras ekster la konkurenco, la proleto staras en ĝi kaj sentas ĉiujn ĝiajn ŝanceliĝojn. La sklavo estas konsiderata aĵo, ne membro de la burĝa socio; la proleto estas agnoskita kiel persono, kiel membro de la burĝa socio.

*8. Demando: Per kio la proleto distingiĝas de la servutulo?*

Respondo: La servutulo havas la posedon kaj la uzadon de produktadinstrumento, de peco da tero, kontraŭ liverado de parto de la

rikolto aŭ kontraŭ liverado de laboro. La proleto laboras per la produktadinstrumentoj de iu alia por tiu alia, kontraŭ ricevo de parto de la rikolto. La servutulo donas, al la proleto oni donas. La servutulo havas sekuran ekzistadon, la proleto ne havas ĝin. La servutulo staras ekster la konkurenco, la proleto staras ene de ĝi. La servutulo liberigas sin per tio ke li forkuras en la urbojn kaj tie fariĝas metiisto, aŭ per tio ke li anstataŭ laboron kaj produktojn donas monon al sia biena sinjoro kaj fariĝas libera farmisto, aŭ per tio ke li forpelas sian feŭdan sinjoron kaj fariĝas mem proprietulo, mallonge, per tio ke li iel aŭ alie eniras la posedantan klason kaj en la konkurencon. La proleto liberigas sin per tio ke li nuligas la konkurencon, la privatan proprieton kaj ĉiujn klasajn diferencojn.

*9. Demando: Per kio la proleto distingiĝas de la metiisto?*[23]

*10. Demando: Per kio la proleto distingiĝas de la manufakturlaboristo?*

Respondo: La manufakturlaboristo de la deksesa ĝis la dekoka jarcento havis preskaŭ ĉie ankoraŭ en sia posedon sian teksilon, ŝpinilojn por sia familio, malgrandan kampon, kiun li kulturis en kromaj horoj. La proletaro ne havas ĉion ĉi. La manufakturlaboristo vivas preskaŭ ĉiam en la kamparo kaj en pli aŭ malpli patriarĥaj kondiĉoj kun sia bien-sinjoro aŭ labordonanto; la proleto vivas plej ofte en grandaj urboj kaj havas kun sia labordonanto puran monrilaton. La manufakturlaboristo estas de la granda industrio elŝirata el siaj patriarĥaj kondiĉoj, perdas la posedon kiun li ankoraŭ havis, kaj nur per tio fariĝas mem proleto.

*11. Demando: Kiuj estis la tujaj sekvoj de la industria revolucio kaj de la disiĝo de la socio en burĝoj kaj proletoj?*

Respondo: Unue, pro tio ke la prezoj de la industriproduktoj fariĝis ĉiam pli malaltaj pro la maŝinlaboro, en ĉiuj landoj de la mondo la malnova sistemo de manufakturo aŭ de industrio, bazita sur manlaboro, estis tute detruata. Ĉiuj duonbarbaraj landoj, kiuj ĝis tiam estis restintaj pli aŭ malpli fremdaj al la historia evoluo kaj kies industrio baziĝis ĝis tiam sur manufakturo, estis per tio perforte elŝiritaj el sia fermiteco. Ili aĉetis la pli malmultekostajn varojn de la angloj kaj lasis siajn proprajn manufakturlaboristojn perei. Tiel, landoj, kiuj de jarmiloj ne faris progreson, ekz-e Hindio, estis komplete revoluciigitaj, kaj eĉ Ĉinio proksimiĝas nun al

[23]Por la mankanta respondo Engelso lasis en la manuskripto duonan paĝon libera.

revolucio. Oni venis al tio, ke nova maŝino, kiu estas hodiaŭ inventita en Anglio, ene de jaro senpanigas milionojn da laboristoj en Ĉinio. Tiamaniere la granda industrio kunligis ĉiujn popolojn de la tero inter si, kunĵetis ĉiujn lokajn merkatojn al mondmerkato, preparis ĉie la civilizacion kaj la progreson kaj atingis tion, ke ĉio, kio okazas en la civilizitaj landoj, devas retroefiki al ĉiuj aliaj landoj. Tiel ke, se nun en Anglio aŭ Francio la laboristoj liberigas sin, tio devas sekvigi revoluciojn en ĉiaj aliaj landoj, kiuj pli aŭ malpli frue alkondukas la liberigon de la tieaj laboristoj.

Due, ĝi disvolvis ĉie, kie la granda industrio anstataŭis la manufakturon, disvolvis la burĝaron, ties riĉaĵon kaj potencon en plej alta grado kaj faris ĝin la unua klaso en la lando. La sekvo de tio estis, ke ĉie, kie tio okazis, la burĝaro ricevis la politikan potencon en siajn manojn kaj forŝovis la ĝis tiam regantajn klasojn, la aristokrataron, la gildajn burĝojn[24] kaj la reĝan reĝimon, kiu reprezentis ambaŭ.

La burĝaro neniigis la potencon de la aristokrataro, de la nobelaro, per tio ke ĝi nuligis la majoratojn aŭ la nevendeblon de la grundposedo kaj ĉiujn nobelajn privilegiojn. Ĝi detruis la potencon de la gildaj burĝoj per tio, ke ĝi nuligis ĉiujn gildojn kaj metiajn privilegiojn. Ĝi anstataŭigis ambaŭ per la libera konkurenco, t.e. la stato de la socio, en kiu ĉiu havas la rajton funkciigi ĉian ajn industribranĉon, kaj en kiu nenio povas malhelpi lin ĉe tiu agado ol la manko de la kapitalo necesa por tio.

La enkonduko de la libera konkurenco estas do la publika deklaro, ke ekde nun la membroj de la socio estas malegalaj jam nur en tio, ke iliaj kapitaloj estas malegalaj, ke la kapitalo estas la decida potenco kaj ke per tio la kapitalistoj, la burĝoj, fariĝis la unua klaso en la socio. Sed la libera konkurenco estas por la komenco de la granda industrio necesa, ĉar ĝi estas la sola socia stato en kiu la granda industrio povas leviĝi. La burĝaro, post kiam ĝi estis tiel neniiginta la socian potencon de la nobelaro kaj de la gildaj burĝoj, neniigis ankaŭ ilian politikan potencon. Kiel ĝi estis leviĝinta en la socio al unua klaso, tiel ĝi proklamis sin ankaŭ en politika formo kiel unua klaso. Ĝi faris tion per enkonduko de la reprezenta sistemo, kiu baziĝas sur la civitana egaleco antaŭ la leĝo, la leĝa agnosko de la libera konkurenco, kaj estis en la eŭropaj landoj enkondukita en formo de konstitucia monarĥio. En tiuj konstituciaj monarĥioj nur tiuj estas elektantoj, kiuj posedas certan kapitalon, do nur la burĝoj; tiuj burĝaj elektantoj elektas deputitojn, kaj tiuj burĝaj deputitoj elektas, per la rajto je impostrifuzo,

[24]En la originalo: Zunftbürger. -vl

burĝan registaron.

Trie, ĝi disvolvis ĉie la proletaron en la sama mezuro en kiu ĝi disvolvis la burĝaron. En la sama proporcio, en kiu la burĝoj riĉiĝis, en la sama proporcio la proletaroj multiĝis. Ĉar pro tio ke la proletaroj dungeblas nur de la kapitalo kaj la kapitalo pliiĝas nur se ĝi dungas laboron, tial la multiĝo de la proletaro precize kunpaŝas kun la pliiĝo de la kapitalo. Samtempe ĝi kunigas la burĝojn kiel la proletojn en grandajn urbojn, en kiuj la industrio plej avantaĝe funkciigeblas, kaj donas per tiu kunigo de grandaj amasoj sur malgrandan lokon al la proletoj la konscion pri sia forto. Krome, ju pli ĝi evoluas, ju pli novaj maŝinoj inventiĝas, kiuj anstataŭas la manlaboron, des pli la granda industrio premas la salajron, kiel jam dirite, al ties minimumo kaj per tio igas la situacion de la proletaro pli kaj pli neeltenebla. Tiel ĝi preparas unuflanke per la kreskanta malkontento, aliflanke per la kreskanta povo de la proletaro, revolucion de la socio fare de la proletaro.

*12. Demando: Kiuj estis la kromaj sekvoj de la industria revolucio?*

Respondo: La granda industrio kreis en la vapormaŝino kaj en la ceteraj maŝinoj la rimedojn pliigi ĝis senfine kaj en mallonga tempo kaj kun malmultaj kostoj la industrian produktadon. La libera konkurenco, necese estiĝinta el tiu granda industrio, alprenis ĉe tiu facileco de produktado baldaŭ ekstreme violentan karakteron; multaj kapitalistoj ĵetis sin sur la industrion, kaj en mallonga tempo fabrikiĝis pli ol kion oni povis uzi. La sekvo de tio estis, ke la fabrikitaj varoj ne vendeblis kaj ke aperis tiel nomata komerca krizo. La fabrikoj devis halti, la fabrikistoj bankrotis, kaj la laboristoj senpaniĝis. Ĉie aperis la plej granda mizero. Post iom da tempo la superfluaj produktoj estis venditaj, la fabrikoj rekomencis labori, la salajro kreskis, kaj iom post iom la aferoj iris ree pli bone ol iam ajn. Sed ne longe, jen denove tro da varoj estis produktitaj, kaj nova krizo aperis, kiu evoluis ĝuste kiel la antaŭa. Tiel ekde la komenco de tiu ĉi jarcento la stato de la industrio konstante ŝanceliĝis inter epokoj de prospero kaj epokoj de krizo, kaj preskaŭ regule ĉiuj kvin ĝis sep jaroj[25] aperis tia krizo, kiu estis ĉiufoje

[25]En la jaro 1892 Engelso skribis en la antaŭparolo al la 2-a eldono de la „Situacio de la laboranta klaso en Anglio” pri la cirkuladperiodoj de la industriaj krizoj komence de la 19-a jarcento: „En la teksto la cirkulad-periodo de la grandaj industriaj krizoj estis indikita je kvin jaroj. Tiu estis la tempa determinado kiu ŝajne rezultis el la evoluo de la okazaĵoj de 1825 ĝis 1842. Sed la historio de la industrio de 1842 ĝis 1868 pruvis, ke la reala periodo estas dekjara, ke la interaj krizoj estis

ligita kun la plej granda mizero de la laboristoj, kun ĝenerala revolucia ekscitiĝo kaj kun la plej granda danĝero por la tuta ekzistanta stato.

*13. Demando: Kio sekvas el tiuj regule ripetiĝantaj komercaj krizoj?*

Respondo: Unue: Ke la granda industrio, kvankam ĝi mem en sia unua evolufazo kreis la liberan konkurencon, nun tamen elkreskis el la libera konkurenco; ke la konkurenco kaj entute la funkciado de la industria produktado fariĝis por iuj kateno, kiun ĝi devas rompi kaj rompos; ke la granda industrio, tiom longe kiom ĝi estas funkciigata en la nuna skalo, povas konserviĝi nur per de sep jaroj al sep jaroj ripetiĝanta ĝenerala konfuziĝo, kiu ĉiufoje minacas la tutan civilizacion kaj ne nur ĵetas la proletojn en la mizerojn, sed ruinigas ankaŭ grandan nombron da burĝoj; ke do la granda industrio mem estas tute forlasenda, kio estas absoluta maleblo; aŭ ke ĝi vere necesigas tute novan organizon de la socio, en kiu jam ne unuopaj inter si konkurantaj fabrikistoj, sed la tuta socio gvidas la industrian produktadon laŭ fiksa plano kaj laŭ la bezonoj de ĉiuj.

Due: Ke la granda industrio kaj la per ĝi ebligita senfina etendo de la produktado ebligas staton de la socio, en kiu tiom multe da ĉiaj vivbezonaĵoj estas produktata, ke ĉiu membro de la socio per tio estas kapabligita disvolvi kaj aktivigi ĉiujn siajn fortojn kaj disponojn en kompleta libereco. Tiel ke do ĝuste tiu eco de la granda industrio, kiu en la nuna socio produktas ĉian mizeron kaj ĉiujn komercajn krizojn, estas ĝuste tiu sama, kiu sub alia socia organizo neniigos tiun mizeron kaj tiujn malfeliĉigajn ŝanceliĝojn. Tiel ke estas plej klare pruvite:

1. ke ekde nun ĉiuj ĉi malbonaĵoj atribueblas nur al la sociordo kiu jam ne taŭgas por la kondiĉoj kaj

2. ke la rimedoj ekzistas por tute forigi tiujn malbonaĵojn per nova sociordo.

*14. Demando: Kia devas esti tiu nova sociordo?*

Respondo: Antaŭ ĉio ĝi devas preni la funkciadon de la industrio kaj de ĉiuj produktadbranĉoj entute el la manoj de la unuopaj inter si konkurantaj individuoj kaj doni ĝin al la tuta socio, tio signifas ke ili estos mastrumataj je komuna konto, laŭ komuna plano kaj kun partopreno de ĉiuj membroj de la socio. Ĝi do nuligos la konkurencon kaj anstataŭigos ĝin per la asocio.

---

sekundaraj kaj de 1842 pli kaj pli malaperis.” (Vidu vol. 2, p. 642)

Ĉar la funkciado de la industrio fare de izolitaj individuoj implicas nepre la ekzistadon de privata proprieto kaj ke la konkurenco estas nenio alia ol tiu reĝimo de la industrio kie certa nombro da privatuloj gvidas ĝin, la privata proprieto estas nedisigebla de la funkciigado de la industrio fare de izolitaj individuoj, kaj de la konkurenco. Oni devas do ankaŭ forigi la privatan proprieton kaj anstataŭigi ĝin per la kolektiva uzado de ĉiuj produktadrimedoj kaj disdivido de ĉiuj produktoj laŭ komuna interkonsento, kion oni nomas komuneco de havaĵoj. La forigo de la privata proprieto estas eĉ la plej mallonga kaj plej karakteriza resumo de tiu transformado de la tuta socio kiun la evoluo de la industrio necesigas. Pro tio ĝi estas, prave, la precipa postulo de la komunistoj.

*15. Demando: Ĉu la forigo de la privata proprieto antaŭe do ne eblis?*

Respondo: Ne. Ĉiu ŝanĝo en la socia ordo, ĉiu ŝanĝego en la proprietrilatoj estis la nepra sekvo de kreado de novaj produktadfortoj, kiuj jam ne volis adaptiĝi al la malnovaj proprietrilatoj. La privata proprieto mem estiĝis tiel. Ĉar la privata proprieto ne ekzistis ĉiam, sed, kiam je la fino de la mezepoko per la manufakturo kreiĝis nova maniero de produktado, kiu ne submeteblis al la tiamaj feŭda kaj gilda proprieto, tiam tiu manufakturo elkreskinta el la malnovaj proprietrilatoj produktis novan proprietformon, la privatan proprieton. Sed por la manufakturo kaj por la unua evoluŝtupo de la granda industrio ne eblis alia proprietformo ol la privata proprieto, nenia alia sociordo ol tiu kiu baziĝas sur la privata proprieto. Tiom longe, kiom ne eblas produkti tiom, ke ne nur estas sufiĉe por ĉiuj, sed eĉ kromaĵo da produktoj por pliigo de la socia kapitalo kaj por plua elformado de la produktivaj fortoj de la socio, tiom longe devas ĉiam ekzisti reganta klaso disponanta pri la produktadfortoj de la socio kaj malriĉa, subpremata klaso. Kiaj tiuj klasoj estos, tio dependos de la evoluŝtupo de la produktado. La mezepoko dependa de la kampkulturo donas al ni la baronon kaj la servutulon, la urboj de la malfrua mezepoko montras al ni la gildan majstron kaj la submajstron kaj la tagsalajrulon, la deksepa jarcento havas la manufakturiston kaj la manufakturlaboriston, la deknaŭa la grandan fabrikiston kaj la proleton.

Estas klare ke ĝis nun la produktadfortoj ankoraŭ ne estis tiom evoluintaj ke eblis produkti sufiĉe por ĉiuj, kaj ke la privata proprieto fariĝis kateno, baro por tiuj produktadfortoj. Sed nun,

1. dum per la evoluo de la granda industrio produktiĝis unue kapitaloj kaj produktadfortoj en antaŭe neniam konata mezuro kaj la rimedoj ekzistas por

senfine pliigi tiujn produktadfortojn en mallonga tempo;

2. dum due tiuj produktadfortoj estis kunpremitaj en la manoj de malmultaj burĝoj, dum la granda amaso de la popolo fariĝas ĉiam pli proletoj, dum ilia situacio fariĝas en la sama mezuro ĉiam pli maleltenebla, en kiu la riĉaĵoj de la burĝoj pliiĝas;

3. dum trie tiuj gigantaj kaj facile pliigeblaj produktadfortoj tiom elkreskis al la privata proprieto kaj al la burĝoj super la kapon, ke ili ĉiumomente kaŭzas la perfortajn perturbojn en la socia ordo,

– nur nun la nuligo de la privata proprieto estas ne nur ebla, sed fariĝas vere necesa.

*16. Demando: Ĉu la nuligo de la privata proprieto eblos sur paca vojo?*

Respondo: Estus dezirinde, ke tio eblus, kaj la komunistoj estus certe la lastaj kiuj ribelus kontraŭ tio. La komunistoj scias tro bone, ke ĉiuj konspiroj estas ne nur senutilaj, sed eĉ malutilaj. Ili scias tro bone, ke revolucioj ne fariĝas intence kaj arbitre, sed ke ili estas ĉie kaj ĉiam la necesa sekvo de cirkonstancoj, kiuj estas tute sendependaj de la volo kaj de la gvidado de unuopaj partioj kaj de tutaj klasoj.

Sed ili vidas ankaŭ, ke la evoluo de la proletaro en preskaŭ ĉiuj civilizitaj landoj estas perforte subpremata kaj ke per tio la kontraŭuloj de la komunistoj laboras mem plenforte por la revolucio. Se tio fine pelas la subprematan proletaron fine en revolucion, tiam la komunistoj same per la ago kiel nun per la vorto defendos la kaŭzon de la proletoj.

*17. Demando: Ĉu la nuligo de la privata proprieto eblos unufrape?*

Respondo: Ne, same kiel ankaŭ la jam ekzistantaj produktadfortoj ne pliigeblas unufrape tiom kiom necesas por starigi la komunumon. La revolucio de la proletaro, kiu plej verŝajne okazos, povos do nur iom post iom transformi la nunan socion kaj nur poste nuligi la privatan proprieton, kiam la por tio necesa kvanto da produktadrimedoj estas kreita.

*18. Demando: Kian evoluvojon iros tiu revolucio?*

Respondo: Ĝi starigos antaŭ ĉio demokratian ŝtatan konstitucion kaj per tio rekte aŭ malrekte la politikan regadon de la proletaro. Rekte en Anglio, kie

la proletoj jam estas la plimulto de la popolo. Malrekte en Francio aŭ Germanio, kie la plimulto de la popolo konsistas ne nur el proletoj, sed ankaŭ el etaj kampkulturistoj kaj burĝoj, kiuj nur ĵus estas transirantaj en la proletaron kaj en siaj politikaj interesoj pli kaj pli dependiĝas de la proletaro kaj pro tio devos baldaŭ adaptiĝi al la postuloj de la proletaro. Tio eble kostos duan batalon, sed kiu povas fini nur per la venko de la proletaro.

La demokratio estus tute senutila al la proletaro, se ĝi ne estus tuj uzata kiel rimedo por trudi pliajn disponojn kiuj atakas rekte la privatan proprieton kaj kiuj certigas la ekzistadon de la proletaro. La plej gravaj el tiuj disponoj, kiuj rezultas jam nun kiel necesaj sekvoj de la ekzistantaj kondiĉoj, estas la sekvaj:

1. Limigo de la privata proprieto per progresaj impostoj, fortaj hered-impostoj, forigo de heredo de la flankaj linioj (fratoj, nepoj ktp), devigaj pruntoj ktp.

2. Iom-post-ioma eksproprietigo de la grundproprietuloj, fabrikistoj, posedantoj de fervojoj kaj ŝipposedantoj, parte per konkurenco de la ŝtata industrio, parte rekte kontraŭ kompenso en asignatoj[26].

3. Konfiskado de la havaĵoj de ĉiuj elmigrintoj kaj ribeluloj kontraŭ la popola plimulto.

4. Organizado de la laboro aŭ laborigo de la proletoj sur la naciaj[27] bienoj, fabrikoj kaj metiejoj, per kio la konkurenco inter la laboristoj inter si estas forigata kaj la fabrikistoj, tiom longe kiom ili ankoraŭ ekzistas, estas devigataj pagi la saman pli altan salajron kiel la ŝtato.

5. Sama labordevigo por ĉiuj membroj de la socio ĝis la kompleta nuligo de la privata proprieto. Starigo de industriaj armeoj, speciale por la kampkulturo.

6. Centrado de la kreditsistemo kaj de la monkomerco en la manojn de la

[26]Papermono de la unua franca respubliko.

[27]En la originalo: Nationalgüter (naciaj bienoj); la vorto 'nacia' estas ĉi tie kaj en la sekvo uzata verŝajne en la senco de 'ŝtata', konforme al la uzado en Francio kaj aliaj latinidlingvaj landoj; Engelso uzas jen 'ŝtata', jen 'nacia', sen ke evidentas ia diferenco; tamen en la E-a versio mi konservas la du formojn. -vl

ŝtato per nacia banko kun ŝtata kapitalo kaj subpremo de la privataj bankoj kaj bankistoj.

7. Pliigo de la naciaj fabrikoj, metiejoj, fervojoj kaj ŝipoj, kulturebligo de ĉiuj grundoj kaj plibonigo de la jam kulturataj, en la sama mezuro en kiu la kapitaloj kaj la laboristoj disponeblaj por la nacio pliiĝas.

8. Edukado de ĉiuj infanoj, ekde la momento en kiu ili povas malhavi la unuan patrinan flegadon, en naciaj institucioj kaj sur naciaj kostoj. Edukado kaj fabrikado kune.

9. Starigo de grandaj palacoj sur la naciaj bienoj kiel komunaj loĝejoj por komunumoj de civitanoj, kiuj okupiĝas same pri industrio kiel pri kampkulturado kaj kiuj kunigas en si la avantaĝojn de la urba kiel de la kampara vivo, sen dividi la unuflankecojn kaj malavantaĝojn de ambaŭ vivmanieroj.

10. Detruado de ĉiuj malsanigaj kaj malbone konstruitaj loĝejoj kaj urbkvartaloj.

11. Sama heredrajto por eksteredzecaj kiel por geedzecaj infanoj.

12. Koncentrado de la tuta transportsistemo en la manojn de la nacio.

Ĉiuj ĉi disponoj kompreneble ne plenumeblas per unu fojo. Sed unu ĉiam sekvigos la alian. Se jam la unua radikala atako kontraŭ la privata proprieto okazis, tiam la proletaro vidos sin devigata iri ĉiam pli antaŭen, koncentri ĉiam pli ĉian kapitalon, ĉian kampkulturon, ĉian industrion, ĉian transporton, ĉian interŝanĝon en la manojn de la ŝtato. Ĉiuj ĉi disponoj laboras en tiun direkton; kaj ili fariĝos plenumeblaj en precize la sama proporcio kaj disvolvos siajn centrigajn konsekvencojn, en kiu la produktadfortoj de la lando estas pliigataj de la laboro de la proletaro. Fine, kiam ĉia kapitalo, ĉia produktado kaj ĉia interŝanĝo estas kunpremita en la manoj de la nacio, la privata proprieto forfalis de si mem, la mono superfluiĝis kaj la produktado tiom pliiĝis kaj la homoj tiom ŝanĝiĝis, ke ankaŭ la lastaj rilataj formoj de la malnova socio povas fali.

*19. Demando: Ĉu tiu revolucio povos okazi sole en unu sola lando?*

Respondo: Ne. La granda industrio, jam per tio ke ĝi kreis la mondmerkaton, metis ĉiujn popolojn de la Tero, kaj speciale la civilizitajn,

en tioman interligitecon, ke ĉiu unuopa popolo dependas de tio kio okazas ĉe alia. Ĝi krome en ĉiuj civilizitaj landoj tiom samigis la socian evoluon, ke en ĉiuj ĉi landoj burĝaro kaj proletaro fariĝis la du decidaj klasoj de la socio kaj la batalo inter ambaŭ la ĉefa batalo de la tago. La komunisma revolucio do ne estos nur nacia, ĝi estos revolucio okazanta en ĉiuj civilizitaj landoj, do almenaŭ en Anglio, Usono, Francio kaj Germanio samtempe okazanta. Ĝi evoluos en ĉiu el tiuj ĉi landoj pli aŭ malpli rapide, laŭ tio ĉu la koncerna lando posedas pli evoluintan industrion, pli grandan riĉecon, pli gravan kvanton da produktadfortoj. Ĝi plenumeblos do en Germanio plej malrapide kaj plej malfacile, en Anglio plej rapide kaj plej facile. Ĝi efikos ankaŭ grave sur la aliaj landoj de la mondo kaj komplete ŝanĝos kaj rapidigos ties ĝistiaman evolumanieron. Ĝi estas universala revolucio kaj pro tio havos ankaŭ universalan terenon.[28]

*20. Demando: Kiuj estos la sekvoj de la fina nuligo de la privata proprieto?*

Respondo: Per tio, ke la socio forprenas la uzadon de ĉiuj produktadfortoj kaj transportiloj kaj la interŝanĝon kaj la disdividon de la produktoj el la manoj de la privataj kapitalistoj kaj mastrumas ilin laŭ plano kiu rezultas el la ekzistantaj rimedoj kaj la bezonoj de la tuta socio, precipe ĉiuj malbonaj sekvoj estas forigataj kiuj estas nun ankoraŭ ligitaj kun la funkciado de la granda industrio. La krizoj forfalas; la etendita produktado, kiu estas por la nuna ordo de la socio superproduktado kaj tiom potenca kaŭzo de mizero, tiam eĉ ne sufiĉos kaj devos esti ankoraŭ multe pli etendita. Anstataŭ alkonduki mizeron, la superproduktado certigos krom la plej rektajn bezonojn de la socio la kontentigon de ĉies bezonoj, kreos novajn bezonojn

---

[28]La konkludo, ke la proleta revolucio eblas nur samtempe en la evoluintaj kapitalismaj landoj kaj ke per tio ne eblus venke plenumi tiun revolucion en unu sola lando, trovis sian definitivan formuladon en la verko de Engelso „Principoj de la komunismo”; ĝi estis ĝusta pro la periodo de la antaŭmonopolisma kapitalismo.
Sub la novaj historiaj kondiĉoj V. I. Lenino, deirante de la leĝo de la malegaleco de la ekonomia kaj politika evoluo de la kapitalismo en la epoko de imperiismo – leĝo kiun li estis mem malkovrinta – venis al la nova konkludo, ke la venko de la socialisma revolucio eblas komence en kelkaj landoj aŭ eĉ en unu lando, kaj per tio emfazis la maleblon de la samtempa venko de la revolucio en ĉiuj aŭ en la plej multaj landoj. Tiu nova konkludo estis unue formulita de V. I. Lenino en lia artikolo „Pri la devizo de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo” (kp Lenin, Werke, vol. 21, p. 342 sj.)

kaj samtempe la rimedojn por kontentigi ilin.

Ĝi estos la kondiĉo kaj instigo de novaj progresoj, ĝi plenumos tiujn progresojn sen ke per tio, kiel nun ĉiufoje, la socia ordo estas per tio perturbita. La granda industrio, liberigita el la premo de la privata proprieto, evoluos en etendiĝo kompare kun kiu la nuna elformiĝo aperos malgranda, kiel la manufakturo kompare kun la nuntempa granda industrio. Tiu evoluo de la industrio disponigos al la socio sufiĉan kvanton da produktoj por kontentigi per ili ĉies bezonojn. Same la kampkulturo, kiu ankaŭ pro la premo de la privata proprieto kaj de la etparceliĝo estas malhelpata alproprigi al si la jam faritajn plibonigojn kaj sciencajn evoluojn, faros tute novan impeton kaj disponigos al la socio tute sufiĉan kvanton da produktoj.

Tiamaniere la socio estigos sufiĉajn produktojn por povi aranĝi la disdividon tiel ke la bezonoj de ĉiuj membroj estos kontentigataj. La disigo de la socio en diversaj inter si kontraŭaj klasoj fariĝas per tio superflua. Sed ĝi fariĝas ne nur superflua, ĝi estas eĉ ne kongruebla kun la nova sociordo. La ekzistado de klasoj estiĝis el la divido de la laboro, kaj la labordivido en sia nuna formo tute forfalos. Ĉar por porti la industrian kaj la kampkulturan produktadon al la priskribita alteco, la meĥanikaj kaj ĥemiaj rimedoj sole ne sufiĉos; la kapabloj de la homoj kiuj movas tiujn rimedojn devas ankaŭ esti samproporcie evoluintaj. Same kiel la kampkulturistoj kaj manufakturlaboristoj de la lasta jarcento ŝanĝis sian tutan vivmanieron kaj fariĝis eĉ tute aliaj homoj, kiam ili estis ensuĉitaj en la grandan industrion, same la komuna funkciigado de la produktado fare de la tuta socio kaj la el tio sekvanta nova evoluo de la produktado bezonos kaj ankaŭ produktos tute aliajn homojn. La komuna funkciigado de la produktado ne povas okazi per homoj kiel la hodiaŭaj, el kiuj ĉiu estas subordigita al unu sola produktadbranĉo, katenita al ĝi, ekspluatata de ĝi, kiu ĉiu evoluigis nur unu el siaj disponoj surkoste de ĉiuj aliaj, konas nur unu branĉon aŭ nur unu branĉon de branĉo de la tuta produktado.

Jam la nuna industrio povas ĉiam malpli uzi tiajn homojn. La industrio funkciigata laŭplane kaj de la tuta socio tute supozigas homojn kies disponoj estas ĉiuflanke evoluintaj, kiuj kapablas superrigardi la tutan produktadsistemon. La labordivido, jam nun subfositaj de la maŝinoj, kiu faras iun kampkulturisto, la alian ŝuisto, la trian fabriklaboristo, la kvaran borsa spekulisto, do tute malaperos. La edukado ebligos la junulojn rapide trairi la tutan produktadsistemon, ĝi kapabligos ilin transiri laŭvice de unu produktadbranĉo al la alia, laŭ tio ĉu la bezonoj de la socio aŭ iliaj propraj emoj instigas ilin. Ĝi do forprenos de ili la unuflankecon, kiun la nuna

labordivido alpremas al ĉiu unuopulo. Tiamaniere la komunisme organizita socio donos al siaj membroj la eblecon uzi siajn ĉiuflanke evoluintajn disponojn. Sed per tio necese malaperas ankaŭ la diversaj klasoj. Tiel ke la komunisme organizita socio unuflanke estas malkongrua kun la ekzistado de klasoj kaj aliflanke la estigo de tiu socio donas mem la rimedojn nuligi tiujn klasajn diferencojn.

El tio sekvas, ke ankaŭ la antagonismo inter urbo kaj kamparo malaperos. La praktikado de kampkulturado kaj de la industrio, fare de la samaj homoj, anstataŭ de du diversaj klasoj, estas jam pro materiaj kialoj necesa kondiĉo de la komunisma asociado. La diseco de la kampara loĝantaro kiu okupiĝas pri kampkulturado, apud la kunpremiĝo de la industria en la grandaj urboj, estas fenomeno kiu kongruas jam al nur subevoluinta ŝtupo de kampkulturado kaj de industrio, malhelpo por ĉia plua evoluo, kiu jam nun tre senteblas.

La ĝenerala asociiĝo de ĉiuj socianoj al komuna kaj laŭplana ekspluatado de la produktadfortoj, la etendado de la produktado en tia mezuro ke ĝi kontentigos ĉies bezonojn, la ĉeso de stato, en kiu la bezonoj de iuj kontentiĝas surkoste de la bezonoj de la aliaj, la tuta neniigo de la klasoj kaj de iliaj antagonismoj, la ĉiuflanka evoluo de la kapabloj de ĉiuj socianoj per la forigo de la ĝisnuna labordivido, per industria edukado, per la ŝanĝo de aktiveco, per partopreno de ĉiuj en la ĝuaĵoj kreitaj de ĉiuj, per la kunfandiĝo de urbo kaj kamparo – jen la ĉefaj rezultoj de la forigo de la privata proprieto.

*21. Demando: Kian influon la komunisma sociordo havos sur la familio?*

Respondo: Ĝi faros la rilaton de la du seksoj pura privata rilato, kiu koncernas nur la personojn kiuj partoprenas en ĝi kaj en kiun la socio ne rajtas enmiksiĝi. Ĝi povas tion, ĉar ĝi forigis la privatan proprieton kaj edukas la infanojn komune kaj per tio neniigas la du bazojn de la ĝisnuna geedzeco, la dependeco de la virino de la viro kaj tiun de la infanoj de la gepatroj pere de la privata proprieto. En tio kuŝas ankaŭ la respondo al la kriaĉado de bonmoralaj filistroj kontraŭ komunisma komuna posedo pri virinoj. La komuna posedo de virinoj estas rilato kiu apartenas tute al la burĝa socio kaj konsistas nuntempe el prostituado. Sed la prostituado baziĝas sur la privata proprieto kaj falas kun tiu. La komunisma organizaĵo do, anstataŭ enkonduki komunan posedon pri virinoj, male, nuligos ĝin.

*22. Demando: Kiel la komunisma organizaĵo rilatos al la ekzistantaj*

*naciecoj?*

– restas[29]

*23. Demando: Kiel ĝi rilatos al la ekzistantaj religioj?*

– restas

*24. Demando: Kiel la komunistoj distingiĝas de la socialistoj?*

Respondo: La tiel nomataj socialistoj dividiĝas en tri klasojn. La unua klaso konsistas el partizanoj de la feŭda kaj patriarĥa socio, kiu estas neniigita de la granda industrio, la mondkomerco kaj la burĝa socio kreita de ambaŭ kaj kiu estas daŭre ĉiutage neniigata. Tiu klaso tiras el la malbonaĵoj de la nuna socio la konkludon ke la feŭda kaj patriarĥa socio restarigendas, ĉar tiu estis libera de tiuj malbonaĵoj. Ĉiuj ĝiaj proponoj iras sur rektaj aŭ malrektaj vojoj al tiu celo. Tiu klaso de reakciaj socialistoj, malgraŭ siaj laŭdira kompato kaj varmaj larmoj por la mizero de la proletaro estos ĉiam energie atakata de la komunistoj, ĉar

1-e ĝi alstrebas ion tute maleblan;

2-e ĝi strebas restarigi la regadon de la aristokrataro, de la gildaj majstroj kaj manufakturistoj kun ties sekvantaro de absolutaj aŭ feŭdaj reĝoj, oficistoj, soldatoj kaj pastroj, socion, kiu, kvankam libera de la malbonaĵoj de la nuna socio, kompense estis plena de almenaŭ same multaj aliaj malbonaĵoj kaj eĉ ne donis la perspektivon de liberigo de la subpremataj laboristoj per komunisma organizo;

3-e ĝi elmontras siajn verajn intencojn ĉiufoje kiam la proletaro fariĝas revolucia kaj komunisma, kie ĝi tiam tuj alianciĝas kun la burĝaro kontraŭ la proletaro.

La dua klaso konsistas el partizanoj de la nuna socio, al kiuj la malbonaĵoj necese estiĝantaj el tiu ĉi socio vekis timojn pro la pluekzistado de tiu socio. Ili strebas do konservi la nunan socion, sed forigi la kun ĝi ligitajn

[29] En la manuskripto de Engelso staras anstataŭ la respondo ĉe la 22-a kaj la 23-a demando nur la vorto „restas”. Tio signifas evidente ke la respondo restu tia, kia ĝi estis formulita en provizora, sed ĝis nun ne trovita programprojekto de la Ligo de la Komunistoj.

malbonaĵojn. Tiucele iuj proponas nur karitatajn disponojn, la aliaj mirindajn reformsistemojn sub la preteksto reorganizi la socion kaj konservi la bazojn de la nuna socio kaj per tio la nunan socion. Tiujn burĝajn socialistojn la komunistoj devos ankaŭ konstante kontraŭbatali, ĉar ili laboras por la malamikoj de la komunistoj kaj defendas la socion kiun la komunistoj ja volas renversi.

La tria klaso fine konsistas el demokratiaj socialistoj, kiuj sur la sama vojo kiel la komunistoj volas parton de la disponoj nomitaj en la demando [18], sed ne kiel transiran rimedon al komunismo, sed kiel disponojn kiuj estas sufiĉaj por forigi la mizeron kaj malaperigi la malbonaĵojn de la nuna socio. Tiuj demokratiaj socialistoj estas aŭ proletoj, kiuj estas ankoraŭ ne sufiĉe instruitaj pri la kondiĉoj de liberigo de sia klaso, aŭ ili estas reprezentantoj de la etburĝoj, de klaso kiu ĝis atingo de demokratio kaj de la el ĝi estiĝantaj socialismaj disponoj havas multrilate la samajn interesojn kiel la proletoj. Pro tio la komunistoj en momentoj de agado interkompreniĝos kun tiuj demokratiaj socialistoj kaj ĝenerale devas sekvi por la momento kiom eble plej komunan politikon, tamen en la mezuro en kiu tiuj socialistoj ne iras en la servon de la reganta burĝaro kaj atakas la komunistojn. Ke tiu komuna agadmaniero ne ekskludas diskutadon de la malkonsentoj kun ili, tio klaras.

*25. Demando: Kiel la komunistoj rilatas al la ceteraj niatempaj politikaj partioj?*

Respondo: Tiu rilato estas diversa laŭ la diversaj landoj. – En Anglio, Francio kaj Belgio, kie la burĝaro regas, la komunistoj havas por la momento ankoraŭ komunan intereson kun la diversaj demokratiaj partioj, kaj pli precize des pli grandan, ju pli la demokratoj en la nun ĉie de ili subtenataj socialismaj disponoj proksimiĝas al la celo de la komunistoj, t.e. ju pli klare kaj decide ili apogas la interesojn de la proletaro kaj ju pli ili apogas sin sur la proletaro. En Anglio ekz-e la ĉartistoj konsistantaj el laboristoj estas senfine pli proksimaj al la komunistoj ol la demokrataj etburĝoj aŭ la tiel nomataj radikaluloj.

En Usono, kie enkondukiĝis la demokratia konstitucio, la komunistoj devos teni sin kun tiu partio kiu volas uzi tiun konstitucion kontraŭ la burĝaro kaj en la intereso de la proletaro, t.e. kun la kampkulturaj naciaj reformistoj.

En Svislando la radikaluloj, kvankam mem ankoraŭ tre miksita partio, estas tamen la solaj kun kiuj la komunistoj povas iri, kaj inter tiuj radikaluloj

siavice la vaŭdaj kaj ĝenevaj estas la plej progresintaj.

En Germanio fine la decida batalo inter la burĝaro kaj la absoluta monarĥio ankoraŭ prepariĝas. Sed ĉar la komunistoj ne povas pensi pri la decida batalo inter si mem kaj la burĝaro antaŭ ol la burĝaro regas, tial estas la intereso de la komunistoj helpi la burĝaron kiom eble plej rapide al regado, por kiom eble baldaŭ poste renversi ĝin. La komunistoj devas do, fronte al la registaroj, ĉiam apogi la liberalajn burĝojn kaj tamen gardi sin dividi la memtrompiĝojn de la burĝoj aŭ kredi la logajn asertojn pri la bonfaraj sekvoj kiujn la venko de la burĝaro havus por la proletaro. La solaj avantaĝoj, kiujn la venko de la burĝaro donos al la komunistoj, konsistos
1-e en diversaj koncedoj, kiuj faciligos al la komunistoj la defendadon, diskutadon kaj disvastigadon de siaj principoj kaj per tio la unuiĝon de la proletaro al dense ligita, batalpreta kaj organizita klaso; kaj
2-a en la certeco ke ekde la tago, kiam la absolutaj registaro falos, estos la vico de la batalo inter burĝaro kaj proletoj. Ekde tiu tago la partipolitiko de la komunistoj estas la sama kiel en la landoj kie la burĝaro regas jam nun.

*Verkita fine de oktobro ĝis novembro 1847.*

*Laŭ la manskribo.*

## Monda Asembleo Socia (MAS) …

… estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto (reta, laŭokaze papera) *Le Monde diplomatique en Esperanto* (*http://eo.mondediplo.com)* volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retpoŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en la sekvapaĝe listigita libro „Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...”. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: http://mas-eo.org enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – jen laŭ la vico de ilia apero:

– **C. F. Ramuz: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), 2007

– **Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007

– **Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007

– **Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, 2007

– **GBEGLO Koffi: Esperantujismo**, 2008

– **Johano Besada: Eseoj**, 2008

– **Karlo Markso: Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2008

– **Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), trad. de Amparado Cisnero, 2009

– **Dominique Vidal: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj** – trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

**– Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

**– Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso,** trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

**– Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso,** trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

- **Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo**, 2009

**- Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio**. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, 2009

**- Karlo Markso: La mizero de la filozofio,** respondo al J.B. Prudono: „La filozofio de la mizero"; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono.** Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009

**– Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1**, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, 2009

**– Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo – La Kuba Kvinopo**, tradukoj de div. MAS-anoj, 2009

**– Elisée BYELONGO IŜELOKE: Eĥoj el Bembujo.** Tradicio, rilatoj kun Banyamulenge, la genezo de la milito en Kongolando-Kinŝaso, kaj la diasporo rilate al Esperanto, 2009

**– Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009

**– La homo kaj lia naturoLa bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj.** Eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009

**– Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo*, Ĉapitroj unua ĝis naŭa,*** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2009

**– Frederiko Engelso: Pri la origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano , 2010

**– Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo, Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2010 (tiu ĉi libro).

La libroj de MAS akireblas ĉe la kutimaj librovendejoj en Esperantujo, precipe ĉe tiuj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Iliaj tekstoj estas libere elŝuteblaj por membroj de MAS.

Karlo Markso; Frederiko Engelso:
Tezoj pri Fojerbaĥo, Principoj de komunismo
kaj aliaj verketoj
Monda Asembleo Socia (MAS), 2010

Enpaĝigita de Monda Asembleo Socia (MAS)
per OpenOffice 3.1.1
kaj litertiparo DejaVu Serif (10 pt)
sub Mandriva-Linukso 2010.0

ISBN 978-2-918300-17-5

Presita en Germanio 2010